REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo *№ 2 (93) aprilo 2016*



en la numero:

60 jaroj *de E-agado en Krasnodar*

la fenomeno *de akuzativo en Esperanto kaj Ido*

impresoj *de Anna Striganova pri la nova romano de Mikaelo Bronŝtejn*

versaj impresetoj *pri Koreio*

novaj tradukoj *de Ludmila Novikova el Anna Aĥmatova kaj Konstantin Gusev*

novaj versaĵoj *de Klara Ilutoviĉ*

"Bulteno de REU", *novaĵoj kaj multo alia*

Moskvo, 2016

enhavo

01 Duonjarcento en Esperantujo (V.Aroloviĉ, daŭrigo)

20 60 jaroj de E-agado en Krasnodar (A.Ivasenko)

22 La fenomeno de akuzativo en Esperanto kaj Ido (A.Seliŝĉev)

27 Lingva festivalo en Iĵevsk (R.Mitin, I.Gonĉarova)

29 (BdR) Festivala printempo (I.Gonĉarova)

31 (BdR) Kvina Internacia KER-sesio (S.Smetanina)

31 (BdR) V.Aroloviĉ – 70-jara!

35 (BdR) Pri Semjon Vajnblat (L.Novikova)

36 (BdR) 75-jariĝo de Gennadij Ŝilo

39 (BdR) In memoriam – Valentina Lisijenkova, Larisa Denisova

40 (BdR) Nova informletero pri KET

41 Kelkaj impresoj pri la romano “Mi stelojn jungis al revado” (A.Striganova)

47 Nova disko de “Kajto”

48 Dek du impresetoj pri Koreio (M.Bronŝtejn)

54 Versaĵoj de Anna Aĥmatova en tradukoj de Ludmila Novikova

56 Versaĵoj de Konstantin Gusev en tradukoj de Ludmila Novikova

63 Novaj versaĵoj de Klara Ilutoviĉ

k3 E-agado en Krasnodar: historio kaj nuntempo (fotoj)

jubilea torto por Viktoro Aroloviĉ

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 2 (93) aprilo 2016

aperadas ekde 2000

redaktas **Georgij Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2016:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 700 rubloj, sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386
en la pagsistemo “Яндекс.Деньги”

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

elektronika abono *– 350 rub. (10 eŭr.)*

Viktor Aroloviĉ

DUONJARCENTO EN ESPERANTUJO

(*Daŭrigo*[1])

La dekkvara, neordinara

En 1972 la vica SEJT-14 laŭ decido de la 5-a SEJM-Konferenco estis okazonta en Novosibirsk. La preparado pasis laŭ la kutima ordo: novosibirskaj E-istoj trovis konvenan lokon, interkonsentis kun la mastroj, preparis kaj dissendis la unuan pritendaran bultenon; la potencialaj tendaranoj sendis plenigitajn aliĝilojn kaj kotizojn. La ĉeforganizanto Vladimir Sibircev informis, ke la aranĝo estas aprobita en la provinca komitato de Komsomolo, jam printempe ŝajnis ke ĉiuj demandoj estas solvitaj. Tamen pli proksime al la evento neatendite aperis informoj, ke pli altrangaj lokaj instancoj fakte malpermesis la tendaron: eksciinte ke temas pri tutsovetia aranĝo, ili postulis permeson el Moskvo. Tamen la sola oficiala E-instanco en la ĉefurbo tiam estis la E-komisiono de SSOD, kiu havis kiel taskon okupiĝi nur pri internaciaj ligoj, sed enlandaj aferoj estis ekster ĝia kompetenteco. Do plua baraktado de novosibirskanoj estis sensukcesa kaj eĉ tragika: ne eltenis la koro de veteranino Varvara Vereŝagina, kiu dum multaj jaroj gvidis Novosibirskan E-klubon…

La tendaro estis planita por la 12-a – 23-a de aŭgusto, kun la 6-a SEJM-Konferenco antaŭ ĝi la 8-an – 12-an. La prezidanto de SEJM Boris Kolker dissendis al la komitatanoj alarman leteron (datitan 23.07), petante ke Vitas Ŝilas, Algis Vizgirdas (Litovio), Aristo Medinŝ (Latvio) aŭ Eŭgeno Perevertajlo (Uzbekio) provu urĝe aranĝi sovaĝan tendaron (aŭ almenaŭ la Konferencon) la 15-an – 25-an de aŭgusto. Ĉu la menciitaj kvar kolegoj ion provis, mi ne scias, sed proponoj de ili ne venis. Min Boris ne petis, kredeble opiniante ke varianto apud Moskvo estus senŝanca.

Tamen mi pridiskutis la situacion kun aliaj moskvaj aktivuloj, kaj ĉiuj subtenis la ideon, ke ankaŭ ni serĉu alternativon en Apudmoskvo. Mi havis informlibron pri Apudmoskvo, ĝi priskribis diversajn ripozeblecojn en Moskva provinco. Esplorante informojn pri tio, mi rimarkis ke krom ordinaraj turistejoj, kie oni probable elaĉetas anticipe individuajn ripozkartojn, ekzistas ankaŭ tendaj urbetoj, apartenantaj al la provinca departemento pri ĉiutaga priservado (“бытовое обслуживание”) de la loĝantaro; al tiu departemento apartenis ankaŭ la luad-servo (“прокат”). En tiaj tendaroj oni disponigis noktumlokojn lue por interkonsentata daŭro kontraŭ kontanta

[1] La komencon vidu en REGo, № 1 (92), p. 1-26.

mono. La varianto ŝajnis alloga, ĉar devus esti pli malmultekosta kaj postulus malpli da formalaĵoj. Mi vizitis la menciitan departementon kaj parolis kun vicestro, klarigante nian bezonon diskrete: ni estas klubo laŭ interesoj; do ni ŝatus scii, ĉu ni povas en tenda urbeto de via sistemo amase ripozi dum dek tagoj en kvanto 100 personoj (aŭ iom pli), inter kiuj estos aliurbaj gastoj, kaj ĉu necesas iu oficiala papero por tio? La respondo estis, ke tenda urbeto kutime povas akcepti eĉ konsiderinde pli da homoj kaj neniu papero bezonatas, nur pagu la monon! Fine la vicestro rekomendis al mi kelkajn lokojn por elekti.

Mi rakontis pri la vizito en la klubo, kaj ni decidis veturi surloken por esplori. Ĉiuj konsentis, ke ju pli proksime al Moskvo mem, des malpli bone por ni, ĉar povus ne sufiĉi lokoj. Do ni elektis la plej malproksiman varianton: ĉe la vilaĝo Sokolova Pustinj, apud la urbo Stupino sud-oriente de Moskvo, ĉelime de la provinco. La esplorvojaĝon ni faris triope: Boris Tokarev, Nikolao Poljakov kaj mi. La loko evidentiĝis sufiĉe facile atingebla: elektrotrajne ĝis Stupino, poste per urba buso. La tendareto mem kontentigis minimumajn turismajn kondiĉojn: dormado en tendoj (memorŝajne kun litaĵoj), nutrado liverata el urba manĝejo kaj konsumata ĉe tabloj kun benkoj sub plasta kvazaŭtegmento, primitivaj lavujoj kaj necesejaj budoj, apude fluas la rivero Oka, moderaj prezoj, ceteraj ripozantoj malmultas. La mastroj (du viroj) komprenigis ke ili estas interesitaj pri ni, ĉar tia amasa veno de ripozantoj grave plibonigus la financan situacion de la tendareto. Pri kio konkrete okupiĝos la novaj gastoj, ilin tute ne interesis: gravas nur, ke ni ne diboĉu, ne bruaĉu nokte kaj memkompreneble faru nenion kontraŭleĝan. Ni interrigardis, kaj mi flustris al Tokarev: “Paradizo!”, li kapjesis. Ni revenis kun firma opinio ke pli bonan varianton por SEJT neniu proponos. Estis dimanĉo, tuj telefoni al Kolker mi ne povis, ĉar li tiam havis nur ofican telefonon.

Sekvatage (la 31-an de julio) mi telefonis al Boris kaj informis pri nia esploro kaj ĝiaj rezultoj. Mi diris, ke ni pretas akcepti la tendaron kaj, se li subtenas, dissendi novajn informilojn. Post nelonga pripenso li diris: “Jes, bone”, kaj mi suspiris kun faciliĝo, sed… la saman tagon venis neatendita telegramo. Tiutempe en Omsk estis funkcianta la 3-a esperantista SKT (studenta konstrutaĉmento), kaj oni (kredeble novosibirskanoj preter la Komitato de SEJM, ĉar Kolker en la telefonparolo kun mi nenion diris pri tio) interkonsentis kun ties stabo, ke la tendaro estu evakuita tien, kun la kondiĉo ke en la programo estos ĉiutaga 4-hora laboro; do la konstrutaĉmenta stabo dissendis telegramojn pri tio al la SEJT-aliĝintoj. Al ni en Moskvo tiu solvo ŝajnis paliativa: nek SEJT ricevus sufiĉan tempon por la tradiciaj programeroj, nek por SKT estus bone redukti sian labortempon ĝis

duontago. Tamen pri la definiva solvo de la embarasa problemo devis anonci la prezidanto. Pesinte ĉiujn "por" kaj "kontraŭ", Boris Kolker decidis favore al nia varianto.

Do la tuta tendara rado ekruliĝis niadirekten – nur du semajnojn antaŭ la komenco. La 2-an de aŭgusto la aliĝintoj ricevis novajn telegramojn, ke la tendaro okazos en Moskvo, kun mia adreso porkontakte. Ni urĝe kompilis la novan tendaran bultenon kaj dissendis ĝin tra la tuta SEJM. La tendaran periodon ni anoncis por la 15-a – 25-a de aŭgusto; la SEJM-Konferenco estis okazonta ne antaŭ la tendaro, sed enkadre de ĝi, kiel en 1967-69. Por orientiĝo ni petis ke la kluboj informu anticipe, dezirinde telegrafe, la kvantojn de siaj venontoj. Por operativaj surlokaj informoj afable konsentis helpi veterano Konstantin Lavrentjev, kaj ni indikis lian telefonon.

Necesis provizi la tendaron per tradiciaj atributoj. Por mendi tendarajn insignojn tempo mankis, kaj la surmanikajn emblemojn ni faris mem laŭ mia skizo, uzante blankan tolon, kartonan ŝablonon, nilonan ŝtrumpon kaj verdan farbon. En tiu laboro min grave helpis Svetlana Ŝejko (poste Karelina). La rezulto estis primitiva, sed pli bona ol nenio.

Krome, ni sendepende de la tendaro jam estis preparantaj novan E-kantaron "Kun kanto tra Esperantujo" (nur tekstoj, sen notoj). Do aperis grava kaŭzo por tiun laboron plirapidigi, por ke la broŝureto estu preta antaŭ la tendaro kaj ĝin ricevu aŭtomate ĉiu tendarano. La liston de kantoj kompilis mi kun Aleksandro Ĥarjkovskij kaj Galina Lenskaja, la kantotekstojn redaktis mi, la multobligon prizorgis Nina Kopina (poste Gonĉarova). Ni sukcesis prepari antaŭ la tendaro centon da ekzempleroj, sed venis iom pli da homoj, do la lastaj poste ricevis la kantaron poŝte.

Sed okazigon de la tendaro ekminacis reala danĝero. Intertempe en Apudmoskvo la vetero iĝis eksterordinare seka kaj varmega, ekbrulis torfejoj ka iuloke eĉ arbaroj. Aperis alarma informo, ke pro la incendia danĝero ajnaj fajrobruligoj en arbaroj estas malpermesataj kaj tendaj urbetoj en la tuta Moskva provinco provizore fermiĝas. Do necesis urĝe reviziti la tendarejon kaj kontroli la situacion. La sekvan fojon ni vetruris tien jam 5-6-ope. Ni estis bonŝancaj: la mastroj certigis nin, ke moskvaj malpermesoj ilin ne zorgigas kaj fermi la tendan urbeton ili ne intencas, ĉar Moskvo estas ne tro proksime, sed financan planon plenumi necesas. Ili nur insiste atentigis, ke en la aktuala situacio pri lignofajroj absolute ne povas temi, kaj ni tion akceptis kun senrezerva komprenemo. Ni lasis ĉe la mastroj negrandan antaŭpagon kiel certigon pri seriozeco de niaj intencoj, tamen por plia certeco ili petis ies pasporton. La mia apenaŭ taŭgis, ĉar mia loĝregistro estis komunloĝeja – sekve provizora, des pli baldaŭ finiĝonta. Do sian pasporton oferis Nikolao Poljakov, kaj tio fakte estis la sola leĝa bazo por

ekzisto de la tuta tendaro. Krome, la vivpraktikema Nikolao kunhavis botelon da vino, kaj ni kun la mastroj malplenigis ĝin por sukceso de nia aranĝo.

La priskribita periodo de preparado, atendado kaj neevitebla nervumado enhavis specifajn organiz-financajn problemojn. Vladimir Sibircev transsendis al mi la liston de tiuj, kiuj jam pagis la aliĝkotizojn al Novosibirsk, kaj ni zorgis, ke neniu devu kotizi duafoje – plendoj pri tio, kiom mi memoras, ne estis. (La partoprenkotizoj estis simple resenditaj poŝte.) Tiajn tendaranojn ni nur petis duafoje plenigi la aliĝilojn, ĉar nia modelo estis iom alia. Anticipan kotizakcepton ni rezignis, ĉiu pagis surloke samtempe kun plenigo de la aliĝilo, tuj post la veno por la tuta planata partoprenperiodo. Do jam de la komenco ekzistis iom da manovrebla mono, ĉar ĉiutage mi antaŭmendis al la mastroj konkretajn kvantojn de maten-, tag- kaj vespermanĝoj por la sekva tago. Rezulte ni sukcesis fini la tendaron kun pozitiva bilanco 1 rub. 14 kop.!

Ĉiujn antaŭtendarajn klopodojn mi faris samtempe kun malneta finverkado de la kandidata[1] disertaĵo, ĉar jam estis proksimiĝanta la fino de mia aspiranteco. Do la 14-an frumatene mi veturis en la Instituton pri Aplika Matematiko, lasis la disertaĵon sur la labortablo kaj tuj ekveturis al Sokolova Pustinj, Veninte en la tendarejon, mi trovis, ke kelkaj tendaranoj jam atendas. Do mi tuj aranĝis registradon kun plenigo de aliĝiloj kaj pagado de kotizoj. Tion mi faris mem, ĉar aliaj fidindaj moskvanoj estis venontaj nur poste. Pliaj homoj aperadis dum la tuta tago (entute ĉ. kvarono de la tendaranoj), do mi same tuttage registradis kaj monakceptadis – kaj, kutimiĝinte, poste faradis tion jam rutine ĝis la tendara fermo. Mi ne memoras, ĉu mi okupiĝis ankaŭ pri entendigo aŭ tiun taskon ekspromte surprenis iu alia, sed la liston de tendaranoj kun numeroj de ties tendoj kaj la liston de tendonumeroj kun nomoj de la loĝantoj mi ĉiam havis submane, konstante aktualigante ilin. Entute estis registritaj 105 tendaranoj (du aŭ tri personojn, aperintajn post la fermo, mi jam ne registris, kaj ili ne oponis), sed pluraj venis por 2-3 tagoj diverstempe, do samtempe en la tendaro troviĝis ne pli ol 80-85. Estis reprezentitaj ĉ. 15–20 urboj kaj regionoj.

La programo estis pli-malpli tradicia, tamen pro la menciita malpermeso lignofajrojn ni malhavis. Anstataŭ tio dum la vesperoj ni kolektiĝis ĉirkaŭ fosto kun hela lanterno, kiu staris inter tendoj. Inter la tradiciaj vesperaj aranĝoj menciindas: interkona vespero – organizis Algis Vizgirdas (Klaipeda), okcidenta koncerto – Mikaelo Bronŝtejn (Tula), orienta kon-

[1] En ĉi tiu revuo, legata plejparte de samlandanoj, mi preferas uzi terminon kutiman en Sovetio/Rusio. Por mondvasta legantaro mi skribus pri “doktora” disertaĵo.

certo – Olga Manjuŝina (Ufa), KGS – Nina Korĵenevskaja (Ufa) kaj Tatjana Legkova (Kujbiŝev), adiaŭa vespero – Dmitrij Cibulevskij (Ĥarjkov), gaja vespero – Eŭgeno Perevertajlo (Taŝkent), Vitas Ŝilas (Vilnius), Aristo Medinŝ (Riga). Ĉu dum la laste menciita, ĉu dum la okcidenta koncerto mi voĉlegis plian tradukitan de mi fragmenton el "Dek du seĝoj" (post du jardekoj ĝi estis publikigita[1]). Estis ankaŭ demonstrado de lumbildoj, kaj krome la mastroj, kiuj konjekteble havis en la plano kulturan programon por la ripozantoj, dufoje proponis al ni kinoseancojn. Ni ne oponis, ĉar la aldona monŝarĝo estis eltenebla, sed por inde okupi ĉiujn vesperojn ni ne havis sufiĉe da fortoj.

La tagaj programeroj ĉefe okazis iom flanke de la teritorio, plejparte sur herbejeto inter la tendoj kaj la rivero. La 6-a SEJM-Konferenco funkciis dum sep tagoj, po 3-4 horojn ĉiutage. La tagordo estis pli-malpli kutima: raportoj de kluboj, komitatanoj kaj fakestroj, rezultoj de la interkluba socialisma konkurado, laboro en lernejoj, interkluba informado, elektado k.a. Inter la decidoj menciindas revenigo de Anatolo Gonĉarov al la prezidanteco[2], okazinta eĉ malgraŭ lia foresto. Ĉar evidentiĝis, ke plimulto da gvidaj fadenoj de la tendara vivo koncentriĝis en miaj manoj, do kvazaŭ nature ankaŭ la Konferencon gvidis mi, des pli ke aliaj komitatanoj partoprenis nur partatempe.

SEJT-14, 1972. La 6-a SEJM-Konferenco. Mi ĵus enmanigis premiojn al la venkintoj en la interkluba socialisma konkurado: Ufa (Nina Cvileneva) – la 2-a loko, Klaipeda (Algis Vizgirdas) – la 1-a loko, Riga (Aristo Medinŝ) – la 3-a loko.

Paralele kun la Konferenco okazis paroligaj kursoj, kiujn prizorgis Boris

[1] Cerbe kaj Kore. 1992: № 7 (19), p. 10-14; № 8 (20), p. 8-13.

[2] Dmitrij Cibulevskij en la libro "SEJM. Historia skizo" (p. 22) asertis, ke la prezidanteco de Boris Kolker daŭris ankaŭ en la agadjaro 1972/73. Tiu aserto estis erara – des pli bedaŭrinda, ke Dmitrij mem partoprenis en la Konferenco kaj devus memori, kiun ni reale elektis por la prezida posteno. La kompilita de mi listo de similaj eraroj kun analizo de ties kaŭzoj aperis en alia libro samaŭtora – "ASE. Historiaj notoj" (p. 353–356).

Tokarev (Moskvo) kaj Zoja Skvorcova (Kujbiŝev). Preskaŭ ĉiutage funkciis Somera Universitato, kies rektoro estis Vsevolod Kulikov (Omsk); prelegis plejparte moskvanoj: David Armand, Vladimir Samodaj, Aleksandro Ĥarjkovskij, Boris Tokarev. Okazis Neptuna festo, ĉefrolis barbulo Ĥarjkovskij (kiu kredeble plenumis tiun rolon en preskaŭ ĉiuj tendaroj, kie li partoprenis). Por subteni ordon en la tendaro, precipe dum la manĝoj, estis tagaj deĵorantoj kaj super ili la severa deĵorestro (konstanta tasko) – tiun rolon sukcese plenumis taŝkentano Arkadij Krejzler.

Do ĉio evoluis sufiĉe glate, kaj Boris Kolker, veninta nur meze de la tendara periodo, konkludis: "Tendaro kiel tendaro".

En la antaŭa revunumero vi povis legi pri tio, kiel impresis min SEJT-9, mia unua tendaro. Ĝenerale, observemaj analizistoj en nialanda Esperantujo rimarkis, ke la plua enmovada sorto de ĵusa kursfininto multe dependas de ties unua tendaro, de la impresoj tie ricevitaj. Mi konsentas kun tiu opinio, do ĉi-lige mi kun fiereto rimarkigu, ke tiu ĉi tendaro iĝis la unua SEJT por Svetlana Smetanina, Ludmila Novikova, Paŭlo Jegorovas.

SEJT-14, 1972. Mi kun deĵorantoj dum matena trarigardo de la tendara teritorio.

Galope tra la jaroj (I)

Post SEJT-14 mi eksentis min jam iom alia homo ol antaŭe: porti la ĉefan ŝarĝon dum preparo kaj okazigo de dektaga landskala aranĝo – tio ja estis unika sperto por mi. Supre mia vivpriskribo estis aranĝita kiel pli-malpli kontinua ĉeno de eventoj kaj epizodoj, bazita sur miaj impresoj kiel tiuj de "infano" kaj poste "adoleskanto" en Esperantujo. Sed en la posta tempo, sentante sin jam "plenkreskulo", mi perceptis la eventojn iom alie, kun paso de la jaroj memorfiksante ĉiam malpli da epizodoj, do ankaŭ la ĉi-suba daŭrigo pli proksime al la nuntempo neeviteble iĝos malpli kohera kaj pli fragmenteca; eble eĉ ne ĉiu jaro menciiĝos.

Do, en la restaj monatoj de **1972** mi ĉefe zorgis pri aferoj ligitaj kun la fino de mia aspiranteco. Mi sukcesis nete finverki la disertaĵon, sed, por fari ĝin akceptebla por defendo, necesis ankoraŭ aro da preparaj paŝoj, kiuj de-

zirindigis mian ĉeeston en Moskvo aŭ proksime. Feliĉe mi evitis devigan distribuon por labori en nekonata loko: oni permesis al mi serĉi la ontan laborlokon memstare. Mi ĉesis ricevadi stipendion kaj vivtenis min per hazardaj laborokupoj. En la komunloĝejo la litlokon mi oficiale perdis, sed tie restis pluraj konatoj, dank' al kiuj mi ĉiam sciis, kie estas libera loko, kaj tiamaniere mi pluekzistis tie ankoraŭ ioman tempon.

Rezulte de persista serĉado de konvena laborloko mi trovis sufiĉe bonan varianton: en apudmoskva urbotipa loĝloko (hodiaŭ jam urbo) Staraja Kupavna oni estis antaŭnelonge malfermintaj novan kemi-medicinan instituton, kie estis bezonataj diversfakaj specialistoj, inkluzive matematikistojn. Do post iom da klopodoj en aprilo **1973** mi estis akceptita por labori en la instituto. Estis tamen unu "sed": la instituto malhavis propran komunloĝejon kaj petadis litlokojn ĉe najbara uzino, sed tiu mekanismo funkciis ne perfekte; do por trafi tiun uzinan komunloĝejon mi estis atendonta dum nedifinita tempo, zorgante mem pri tegmento super la kapo. Pli-malpli samtempe oni min definitive forigis el la komunloĝejo, do mi devis serĉi provizoran azilon.

Nun estas ĝusta momento por diri ke tiutempe la duĉambra loĝejo de Leo Medvedev en la apudmoskva Nemĉinovka estis sufiĉe populara inter esperantistoj, kaj tie preskaŭ konstante iu(j) gastis. Estante societema laŭ la naturo, Leo ĉiam ĝojis akcepti esperantistojn ĉu sovetiajn, ĉu fojfoje eĉ eksterlandajn. Lian hejmon ni ŝerce nomis inter ni "Hotelo Esperanto". Do kiam mi diris al Leo pri mia problemo, li senhezite invitis min kunloĝi. Krom la ĉiuvesperaj konversacioj pri diversaj reciproke interesaj temoj, fojfoje mia restado estis praktike utila por Leo mem – precipe kiam li, studinta en la biologi-grundscienca fakultato de MŜU, forestis pro fakaj ekspedicioj kaj mi prizorgis diversajn mastrumajn aferojn. Ekzemple, dum unu el tiaj forestoj venis parencoj de Leo kaj mi kun ili fervore plantis terpomojn en la ĉedoma parcelo. Iom poste, kiam al mi restis jam ne tro longe da tempo por loĝi tie, Leo edziĝis al ivanovanino Ludmila Jegorova. La novgeedzoj interkonsentis paroli inter si nur en Esperanto, kaj mi pruntedonis PIV-on, kiu iĝis por ili grava helpilo dum la konstanta lingvopraktikado en hejmaj cirkonstancoj, postulanta asimiladon de pluraj novaj vortoj. Kaj kiam mi fine ricevis komunloĝejan lokon, mi plulasis la vortaron ĉe Leo kaj Ludmila por nedifinita tempo; ili redonis ĝin nur eksentinte, ke ĝi jam ne estas speciale bezonata.

Pasis jardekoj, kaj mi uzas la okazon por rememore danki Leon pro la tiama tre valora por mi subteno. Nun li ne aktivas en la movado kaj vivas ermite, sed restis fidela al Esperanto kaj ĝiaj idealoj. Ni kontaktas tro malofte, precipe dum liaj jubileoj. Sed Leo scias, ke mi (kaj ne nur mi) lin

memoras kaj ĉiam deziras al li sanon kaj optimismon.

Tamen mi revenu al antaŭlongaj eventoj. En 1973 la tutsovetia gramofondiska firmao "Melodija" emisiis grandformatan (12 kantoj) diskon "Litova kanto – en Esperanto". Tiu fakto, al kiu mi iomete kontribuis, havis kompliketan antaŭhistorion. La eldonon de la disko iniciatis la E-klubo "Juneco" en Vilnius, la ideon subtenis Litova Societo de Amikeco. La bazan laboron faris junecanoj mem: ili (plejparte Vitas Ŝilas) tradukis popularajn litovajn estradajn kantojn, interkonsentis kun profesiaj kantistoj kaj ensembloj kaj faris sonregistraĵon en profesia studio. Poste la registraĵo trafis Rigan gramofondiskan uzinon, kie oni kopiis ĝin sur la plastan diskon. Sed simple multobligi la diskon la uzino ne rajtis: ĝi subiĝis al "Melodija", kaj necesis ties permeso. Do Vitas skribis pri tiu problemo al mi kaj petis helpon por puŝi la aferon. Mi vizitis la firmaon kaj trovis redaktoron, de kies konsento povus dependi la sorto de la disko. Mi jam ne memoras, kiujn argumentojn mi uzis por persvadi lin: plej probable mi montris similan E-diskon de "Balkanton" kaj diris: jen bulgaroj faris, kial nia lando postrestu? Kiel ajn, la redaktoro promesis subtenon, mi komunikis lian nomon kaj la telefonon al Ŝilas, poste tiu jam premis necesajn butonojn surloke, kaj baldaŭ la disko jam estis produktita.

Tarasovka (Apudmoskvo), 2013. Gratulvizito de delongaj E-geamikoj al Leo Medvedev okaze de lia 65-jara jubileo. De maldekstre: Leo, mi, Natalia Arolovič, Tatjana Loskutova, Svetlana Smetanina, Ludmila Novikova.

Tiutempe la plurjara respondeca sekretario de SSOD-komisiono Anatolij Makovskij estis forlasinta la postenon. Lian lokon por nelonga tempo okupis nova por ni homo – Vjaĉeslav Tokmakov. Kiam Boris Kolker kaj mi faris al li la unuan, "sondan" viziton, li lasis malagrablan impreson – tipa "ĝendarmo". Sed poste evidentiĝis, ke tio estis nur parto de la vero. Reale estis tiel: se Tokmakov opinias iun aferon malgrava, ĝi estas senŝanca kaj eĉ provi rekonvinki lin ne indas; sed se oni prezentas al li propo-

non kiun li trovas valora, tiam li ne simple promesos subtenon, sed ne pigros okupigi pri ĝia efektivigo. Tiel okazis, kiam ni interesiĝis pri eventuala partopreno en esperantista renkontiĝo enkadre de la 10-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Berlino. Aŭskultinte niajn argumentojn, Tokmakov proponis ke ni prezentu kelkpersonan liston de kandidatoj. Ni tian liston faris, ĝin rigardis Tokmakov kaj la nova prezidanto de la E-Komisiono ĉe SSOD Magomet Isajev (li okupis la postenon post la morto de prof. Bokarjov). Ili akceptis la liston senopone kaj pludonis ĝin al Komitato de Junularaj Organizaĵoj de USSR. Tie oni jam esploris enketaĵojn de la kandidatoj pli serioze, kaj rezulte forfalis ĉiuj krom unu.

Tiu sola sukcesinta kandidato estis nia klubanino, antaŭ kelkaj jaroj veninta labordistribue el Ivanovo al la apudmoskva Krasnogorsk, Galina Lenskaja. Estante komsomola aktivulino en landskale grava uzino kaj samtempe esperantistino kun kelkjara E-staĝo kaj bona lingvoscio, ŝi tre konvenis por la rolo de tiu delegito de la Festivalo, kiu estus reprezentonta junajn sovetiajn esperantistojn (do fakte SEJM-on) en la festivala E-renkontiĝo. Do nia Galina trafis la liston de delegitoj el Moskva provinco (ĉ. deko), kaj en la ĵurnalo "Moskovskij Komsomolec [Moskva Komsomolano]" aperis pri ŝi kvaronpaĝa artikolo kun pluraj E-mencioj kaj portreto. En la festivala E-renkontiĝo ŝi vigle partoprenis diskutojn, starigis utilajn kontaktojn kun Renato Corsetti, Ulrich Brandenburg kaj aliaj gvidantoj de TEJO.

Post la Festivalo Galina partoprenis en SEJT-15, kiu okazis en Kesterciems (Latvio). En la programo estis ŝia rakonto pri la dumfestivala E-renkontiĝo kaj ĝenerale pri la Festivalo. Do, kiam Galina aperis antaŭ ni, vestita en la speciale kunprenita bela festivala uniformo, la vidaĵo estis ege impona – kontraste kun amaso da ordinaraj, diversgrade paliĝintaj pro la suno, turistaj vestaĵoj de aŭskultantoj. La rakonto de delegito de la Festivalo iĝis unu el memorindaj epizodoj de tiu tendaro, apudinta la kortuŝajn kantojn de Dina Lukjanec pri infanoj en Leningrada blokado kaj pri E-veteranoj, kaj interesegajn prelegojn de iuj el tiuj veteranoj (Semjon Podkaminer, Vsevolod Kulikov k.a.) en Somera Universitato.

Fine de oktobro en Moskvo okazis grava internacia evento – Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj. Venis pli ol tri miloj da delegitoj de tre multaj pacdefendaj organizaĵoj, kaj inter ili MEM (Mondpaca Esperantista Movado), kiun reprezentis MEM-prezidanto Nikola Aleksiev (Bulgario), William Gilbert (Francio) kaj Semjon Podkaminer (Sovetio). Dumkongrese estis subskribita la kunlaborkontrakto inter Monda Packonsilio kaj MEM. Krome en la Kongreso enkadre de landaj delegitaroj partoprenis almenaŭ kvin esperantistoj: du jugoslavoj, geedza paro el Svislando kaj studentino

Ingrid Maier el Svedio. Moskva Internacia E-klubo okazigis kunvenon dediĉitan al la Kongreso, la ok menciitaj delegitoj sidis en la prezidio kiel niaj honoraj gastoj kaj rakontis pri la kongresaj impresoj kaj pri porpacaj E-aktivecoj en siaj landoj. Pri la evento ni faris fotorakonton kaj montris ĝin en la okazinta baldaŭ post tio 10-a CRER en Ivanovo.

Ivanovo, 1973. Dum la 10-a CRER mi rakontas pri la renkontiĝo kun packongresanoj en MIEK.

Post la kunveno mi akompanis Ingrid Maier ĝis la hotelo. Kvankam la piedira distanco ne estis longa, mi sukcesis aŭdi de ŝi multon interesan, i.a. ke ŝi aktivas en TEJO kaj studas profesie la rusan lingvon, do espereble aperados en Moskvo plurfoje. Tiel efektive okazis: Ingrid ofte venadis ĉu por daŭra staĝado, ĉu por kelktaga scienca konferenco; mi kaj aliaj moskvanoj povis vidi ŝin ĉu en la klubo, ĉu en la supremenciita "Hotelo Esperanto"; almenaŭ unu fojon mi renkontis Ingrid en Lenin-biblioteko. Ŝi bone komprenis la specifajn malfacilaĵojn de sovetiaj esperantistoj en internaciaj kontaktoj kaj laŭpove ilin mildigis. Du fundamente valoraj libroj de mia E-biblioteko estis akiritaj dank' al helpo de Ingrid Maier.

En **1974** okazis gravaj por mi E-aranĝoj. La unua el ili – CRER-11 – devis okazi apud Tula dum la unuamajaj ferioj, en tendaj kondiĉoj. Tiutempe Mikaelo Bronŝtejn jam estis transloĝiĝinta al Tiĥvin, sed en Tula restis liaj lernintoj. La plej organizema el ili, Viktoro Rjabinin, jam estis farinta necesajn preparajn paŝojn, kiam fine de aprilo (restis ĉ. semajno antaŭ la festo) ege malboniĝis la vetero: aperis neĝo kaj iĝis netolereble froste. Mi, inspirita de la an-

Moskvo, 1978. En restoracio kun Ingrid Maier kaj Brian Moon el Luksemburgio.

taŭdujara sperto pri transmeto de SEJT-14 el Siberio en Apudmoskvon, decidis iniciati ion similan: provi evakui la renkontiĝon en Moskvon, al urbaj kondiĉoj. Ekspromte okazis komuna kunveno de la junulara sekcio de MIEK kun jam finiĝanta nova E-kurso, kiun gvidis Boris Tokarev. La ideo trovis ĝeneralan aprobon, sed necesis certiĝi pri ebloj. Je nia bonŝanco, inter la kursanoj estis deĵoristino en la Kulturdomo de medicinistoj, kie ni kunvenadis, – Kiralina Piksina. Tiu ege bonkora virino abnegacie proponis sin por deĵori senŝanĝe dum la tuta renkontiĝo, pretis prizorgi en la Kulturdomo areon por surplanka noktado en dormosakoj kaj eĉ akcepti kelkajn personojn por noktumi en sian hejmon, kiu situis proksime. Ankaŭ kelkaj aliaj aktivaj komencantoj esprimis helpemon kaj ricevis siajn etajn taskojn.

Tamen la entuziasmo de la deĵoristino ne garantiis ke ne estos neatenditaj malagrablaĵoj. Por plia certeco mi turnis min al la prezidanto de MIEK Eŭgeno Salnikov, kiu ĉiam subtenis iniciatojn de la junulara sekcio. Ankaŭ ĉi-foje ne estis escepto, do li kun mi vizitis la direktoron de la Kulturdomo por interkonsentigi la aferon. La direktoro Aleksandr Bertman (la konata opera reĝisoro Dmitrij Bertman estas lia filo) rilatis favore al MIEK kaj persone al Salnikov, do mia informo pri CRER kiel kultur-kleriga aranĝo sufiĉis por ricevi lian konsenton. Post tio restis nur sciigi pri nia iniciato al Tula. Mi faris tion senprokraste, kaj baldaŭ venis konsenta telegramo de Rjabinin.

Djutjkovo (apud Zvenigorod, Apudmoskvo), 1974. Moskvaj esperantistoj dum ekskurso al Domo-muzeo de Sergej Tanejev. De maldekstre: Georgij Korotkeviĉ, Nikolao Poljakov, mi, Aleksandro Ĥarjkovskij, Teodoro Kulagin, Kiralina Piksina. Fone – monumento de Tanejev farita de odesa skulptisto, esperantisto Nikolao Blaĵkov.

Sed la restanta tempo jam ne estis sufiĉa por fari ĉion senriproĉe. Ni klopodis fari pli-malpli normalan programon – kun laborkunsidoj, ekskurso, prelegoj, bankedo; aparta ereto estis la kursfina prezento de niaj komencantoj kun koncerteto. Sed ne pri ĉiuj eroj ni bone

sukcesis: estis malglataĵoj kaj fuŝaĵoj, difektintaj la ĝeneralan humoron. Pro tio mi, kiel la ĉefa iniciatinto de la tuta afero, ricevis multe da justa kritiko – kaj dum la fermo de la renkontiĝo, kaj en la ĉefa informilo de SEJM "Aktuale".

Tamen la plej grava por SEJM evento tiujara estis SEJT-16, kiun sukcese organizis Ivanova E-klubo (plej multe kontribuis Tatjana Loskutova kaj Svetlana Smetanina) borde de Volgo, proksime al la urbo Kineŝma. Partoprenis pli ol 200 personoj, inter ili speciale invititaj gravuloj de la E-Komisiono: Magomet Isajev, Semjon Podkaminer, Nikolaj Danovskij (la lasta gvidis la tradukistan kurson).

La tendaron antaŭis la 8-a SEJM-Konferenco, en kiu oni elektis min prezidanto de SEJM. Diference de la elektado en 1971, mi jam estis interne preta al tio, des pli ke jaron pli frue mi iĝis unua vicprezidanto. Kiel vicprezidantoj, kun kiuj mi estis laboronta en la sekva agadjaro, la Komitaton de SEJM eniris: Dmitrij Cibulevskij (Ĥarjkov) – unua vicprezidanto, Vitas Ŝilas (Vilnius) – sekretario, Nina Cvileneva (Ufa) – financoj, Viktoro Laptev (Ĉeljabinsk) – fakoj, Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin) – E-renkontiĝoj, Vladimir Ebel (Barnaul) – interna informado, t.e. la informilo "Aktuale", kaj (bedaŭrinde forpasinta antaŭ kelkaj jaroj) Nikolao Starodubcev (Doneck) – lernejoj. La teamo evidentiĝis laborkapabla kaj konkorda.

SEJT-16, 1974. La unuaj kvar prezidantoj de SEJM: Anatolo Gonĉarov, Vitas Ŝilas, Boris Kolker kaj mi.

En SEJT-16 mi konatiĝis kun Natalia Dolganova el Sizranj, kiu poste iĝis mia edzino.

En **1975** la vica SEJT-17, organizita de Ustj-Kamenogorska klubo, pasis inter montetoj ĉe Ajuda (Orienta Kazaĥio). La 9-a SEJM-Konferenco (kaj paralele kun ĝi paroligaj grupoj por komencantoj) funkciis en la komencaj tagoj de la tendaro. En tiu Konferenco ni unuafoje voĉdonis per mandatoj: la novigon iniciatis mi, subtenis aliaj komitatanoj kaj teknike realigis Ŝilas. Estis aprobita Regularo pri SEJT-oj. La laboron de la Komitato oni ĝenerale taksis pozitive, kvankam iuj agaddirektoj lametis. Rezulte de la elektado

mi denove okupis la prezidan postenon. Ankaŭ la Komitato kerne konserviĝis, escepte ke anstataŭ Vitas Ŝilas elektiĝis lia pli juna samurbano Paŭlo Jegorovas, la Komitaton forlasis Viktoro Laptev kaj Nikolao Starodubcev; grave plifortigis la Komitaton la novelektita Aleksandro Melnikov (Rostov-na-Donu).

Revenvoje el la tendaro mi kun moskvano Anatolo Kazakov haltis por du tagoj en Barnaulo. Ni noktis en ĉambro kunluata de Viktoro Jakovlev kaj Vladimir Ebel, promenis en la urbo, vizitis la hejmojn de Anatolo Gonĉarov kaj Dina Lukjanec, spektis koncerton en sportpalaco. Mi refoje dankas la barnaulanojn pro la agrabla tempopasigo en ilia urbo.

Grava parto de mia tempo tiujare estis dediĉita al lastaj proceduraj paŝoj por finfina defendo de la disertaĵo. Aŭtune mi ĝin sukcese defendis kaj iĝis kandidato de fizik-matematikaj sciencoj.

Novembre CRER-14 denove estis organizota en Moskvo. Mi strebis eviti malfortajn flankojn de CRER-11 kaj ĉefe certigi pli bonajn loĝkondiĉojn ol surplanke, des pli ke por aŭtunaj renkontiĝoj ĝenerale venas homoj malpli turismemaj kaj pli komfortemaj. Tial aperis ideo: antaŭmendi oficiale normalajn hotellokojn, ĝin subtenis Eŭgeno Salnikov. Sed kiam ni por interkonsenti pri koncerna mendlitero venis al Aleksandr Bertman, tiu rifuzis, klarigante, ke simila mendo implicus garantian antaŭpagon, sed ligitan kun tio riskon la financa plano de la Kulturdomo ja ne antaŭvidas. Do riski – des pli, ke ne finance, sed nur morale – decidis mi. Preciziginte atendatajn kvantojn de partoprenontoj el diversaj urboj, mi tajpis mendleteron sur leterfolio de MIEK, donis por subskribi al Salnikov kaj stampis kluban sigelon (ne rondan, sed ovalan, do tute ne oficialan!). Kun tiu letero, ne tre kredante je sukceso, mi iris al la speciala hotela buroo, kie ĉiutage svarmis oficvojaĝantoj kaj reprezentantoj de akceptantaj organizaĵoj. Elteninte certan tempon en la vico, mi eniris la bezonatan kabineton. La oficisto tralegis la leteron kaj demandis nur, kiel ni pagos: ĉu anticipe aŭ alie. Mi respondis ke pagos ne ni, sed la gastoj mem ĉe la enloĝiĝo. Je mia miro, tio kontentigis la ulon: petinte nek plian klarigon nek antaŭpagon, li surmetis rezolucion kaj direktis min al duaranga hotelo (nemultekosta, kun minimuma komforto) por konkreta interkonsento. En la hotelo oni prenis la rezoluciitan mendon kaj klarigis, kiel procedi plu. Rezulte ĉio finiĝis bone, esperantistoj ricevis tegmenton por dumrenkontiĝa restado.

Alia problemeto estis ligita kun la tradicia bankedo. Se iam ni kunvenis por festeni en ies hejmo, tiukaze ni kutime “porubliĝis” – kolektis po 1 rub., kaj tio kutime sufiĉis por manĝi kaj trinki moderkvante. Se necesis mendi lokojn en kafejo aŭ simile, tio certe kostis pli: kutime 3–5 rub. de persono. Trovi lokon por bankedo dum festotagoj ne estis simple, sed kiu

serĉas, tiu trovas – mi trovis. Tamen, vortuminte la demandon pri bankedo por ĉ. 60 personoj, mi aŭdis de la ĉefkelnero la respondon: po 10 rub. Komprenante ke tia sumo multajn hezitigos, mi oponis: vidu, ni estas neriĉaj studentoj (kvankam mi, preskaŭ 30-jara, verdire jam ne tre similis studenton), ne ĉiuj havos tioman sumon – dekon pretos pagi ne pli ol 15-20 el ni; sed se vi povos, simpliginte la menuon, grave redukti la prezon, partoprenos ĉiuj kaj via kaso ricevos rimarkinde pli ol 200 rub. La ĉefkelnero promesis pripensi; kiam mi venis denove, li proponis pagi po 6 rub. Je tio ni interkonsentis; do la bankedon partoprenis praktike ĉiuj, ĝi pasis ende: kaj gaje kaj sate.

En **1976** Boris Kolker, tiutempe Ĉefdelegito kaj Komitatano B de UEA, atingis interkonsenton pri membrigo de kelkaj sovetianoj (temis plejparte pri SEJM-komitatanoj) pere de Fondaĵo Canuto. Do ekde tiu jaro mi daŭre estas membro-abonanto de UEA, ĉiam restante en la listo de subtenatoj.

Somere en Tiĥvin okazis la problema SEJT-18, pri kiu sufiĉe detale rakontis Mikaelo Bronŝtejn en la libro "Legendoj pri SEJM". Mi nur kelkvorte diru pri tio, kiel la eventoj projekciiĝis je mi. Kiel konate, tiu ĉi SEJT estis la lasta unueca por la tuta lando. La 10-a SEJM-Konferenco, okazinta antaŭ la tendaro, decidis, ke en la sekva jaro (kaj poste tio etendiĝis ankaŭ al pluaj jaroj) estu du tendaroj, en la Decidoj tiuj tendaroj estis nomitaj simple Okcidenta tendaro kaj Orienta tendaro. Baldaŭ poste miainiciate aperis la plenaj nomoj Okcident-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro kaj Orient-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro kun respektivaj mallongigoj OkSEJT kaj OrSEJT. En la 10-a SEJM-Konferenco, kiu antaŭis la tendaron, okazis elektado, dum kiu mi cedis la prezidantecon al Mikaelo Bronŝtejn kaj iĝis vicprezidanto pri interna informado – je propra kontento, ĉar redaktora laboro por mi konvenis pli ol la organiz-administra, kvankam ankaŭ tiun mi strebis plenumi respondece.

La jaro **1977** pasis sub la signo de fundamente grava por mi evento: mi edziĝis. Mia fianĉino Natalia Dolganova tiutempe prezidis la E-klubon en Sizranj, ĉiujare gvidis E-kurson, ofte faris publikajn E-prelegojn nome de la urba societo "Scio". Mi tiam daŭre loĝis en uzina komunloĝejo por senfamiliuloj, tamen jam estis konstruata la propra komunloĝejo de nia instituto – do perspektivo estis, sed necesis atendi, kaj dume inter ni estis tiel nomata "gasta geedzeco". Post kelkaj jaroj, kiam la instituta komunloĝejo, eĉ kun sektoro por familioj, jam estis preta, Natalia transloĝiĝis al mi. Ŝi trovis, kvankam ne tuj, en Staraja Kupavna laboron laŭ sia diplomo de muzika pedagogo; multe pli poste tiu laboro al ŝi tedis, do nun ŝi laboras en Moskvo, en turisma firmao. La plej rimarkinda kontribuo de Natalia al moskva E-vivo estis prelegoj pri arto en la klubo "Scio"; laŭ materialoj de

tiuj prelegoj aperis plurjara serio de ŝiaj ilustritaj artikoloj en “Scienco kaj Kulturo”. Lastatempe ŝi ĝenerale ne aktivas, sed se aperas neceso kaj ebleco montri moskvajn vidindaĵojn al eksterlandaj esperantistoj, ŝi volonte faras tion. Nia harmonia geedzeco daŭras jam la kvardekan jaron.

La geedziĝo okazis januare, do la nuptovojaĝon ni prokrastis por la somero. Ni partoprenis laŭvice en tri diverslokaj E-aranĝoj: BET-18 en Rezekne (Latvio), OrSEJT-19 apud Miass kaj la 11-a SEJM-Konferenco en Poltavo (tuj post la samloka OkSEJT-19, paralela al nia OrSEJT). Pri la unua kaj la tria el tiuj aranĝoj mi ne rememoras ion interesan, kvankam ili ambaŭ pasis digne kaj sen rimarkindaj riproĉoj al la organizintoj. Sed pri la dua mi ja havas ion por rakonti.

La tendaro, kies ĉefaj organizantoj estis Ludmila Novikova kaj Vera Dobridina (poste Poliŝĉuk), pasis ĉe la bela lago Turgojak. Evidentiĝis ke disigo de SEJT je okcidenta kaj orienta “duonoj” estis sufiĉe konvencia, ĉar inter la partoprenantoj de OrSEJT estis ankaŭ esperantistoj el okcidentaj regionoj de Sovetio (kredeble simetria situacio estis en OkSEJT-19, almenaŭ ĉar la tendaron sekvis Konferenco por ĉiuj; kaj post 4 jaroj en OkSEJT-23 mi mem bonvenigis orientajn tendaranojn). Inter okcidentanoj venintaj al OrSEJT, estis rimarkindaj aktivuloj, ekzemple rigano Aristo Medinŝ kaj Leonid Borisov el Kolomna (bedaŭrinde ambaŭ jam ne estas kun ni). Entute partoprenis pli ol 120 personoj el pli ol 30 urboj – tiuj nombroj estus dignaj eĉ por unueca SEJT.

La tendaro pasis en tendaj kondiĉoj, do al Natalia kaj mi tre utilis la nuptodonaco de miaj gepatroj (verdire, la ideon pri tio insiste sugestis mi mem, opiniante tion la plej bezonata aĵo por esperantista paro, ĉiujare vizitanta tendarojn) – dupersona tendo. Komence estis kelktaga paroliga periodo. Tiucele ĉiuj tendaranoj (jam anticipe, laŭ la aliĝiloj) estis distribuitaj je ok grupoj, bele nomitaj laŭ diversaj valormetaloj kaj gemoj: “Ametisto”, “Arĝento”, “Diamanto”, “Malaĥito”, “Oro”, “Smeraldo”, “Topazo”, “Turkiso”. Sep grupoj, kunpreninte produktojn, kaldronojn ktp, dise marŝis laŭ diversaj direktoj, starigis en la cellokoj apartajn tendaretojn kaj vivis aŭtonome, ekzerciĝante pri Esperanto kaj samtempe pri bazaj turistaj sperteroj. En ĉiu grupo estis loka esperantisto, bone scianta la itineron, kaj la grupgvidanto – iu el lingve spertaj tendaranoj (inter tiuj estis ekz. Eŭgeno Perevertajlo kaj Vladimir Ebel). La oka grupo, kiun konsistigis grandaĝuloj, kuninfanuloj, malfruintoj ks, restis en la tendarejo.

Certe la funkcion de grupgvidanto mi ne evitis, provizore ignorante la iaman decidon neniam plu instrui (fakte ja ne temis pri plenkursa instruprogramo, sed pri ekzercoj laŭ metodikaj rekomendoj, unuecaj por ĉiuj grupoj, por firmigi la jamajn bazajn sciojn). Mi ricevis la grupon “Smeraldo”, ni

preparis por la tendara koncerta programo kelkajn erojn: salutkanton, teatraĵeton "Foirfesta kanto pri Esperanto-instruisto" de Tomáš Pumpr kaj tradukitan de mi kanton "Najtingala bosko" de A.Poperečnij kaj D.Tuĥmanov. Post kiam la foririntaj grupoj revenis al la tendarejo, ĉiuj iliaj anoj ricevis la insignon "Turisto de USSR".

OrSEJT-19, 1977. Mi kaj Natalia (kun gitaro) en la grupo "Smeraldo".

La ĉefa programo de la tendaro estis kutima: prelegoj, koncertoj, konkursoj. Pri paro da atentindaj eroj, al kiuj mi kontribuis ĉu senpere, ĉu nerekte, legu sube[1].

En **1978** la ĉefa evento de la jaro estis la 63-Universala Kongreso, okazinta en la bulgara urbo Varna. La E-Komisiono ĉe SSOD decidis sendi al la kongreso senprecedentan kvanton da esperantistoj: krom kelkpersona oficiala delegitaro, formiĝis turista anaro – tri grupoj po 35 personoj, do entute pli ol cent kongresanoj. La prepariĝon por tiu evento paralelis aludaj onidiroj koncerne preparatan decidon de CK KPSU pri fondo de esperantista asocio en USSR. Tamen SEJM strebis konservi trankvilon kaj ne "kuri antaŭ lokomotivo". Tiujare OkSEJT-20 estis okazonta en Dagestano, OrSEJT-20 – en Altajo. Ambaŭ tiuj lokoj, sufiĉe periferiaj, malbone konvenis por la Konferenco de SEJM, kiu antaŭsojle de la atendataj ŝanĝoj devus esti laŭeble reprezenta. Do la Komitato decidis – cetere, unuafoje – fari la Konferencon ne en tendaro, nek pli-malpli proksime tempe aŭ/kaj teritorie, sed tute aŭtonome. Ĉar la trigrupa karavano, en kies konsisto estis pluraj SEJM-aktivuloj inkluzive

OrSEJT-19, 1977. Eĉ dumtendare la laboro pri vica numero de "Aktuale" ne devas ĉesi!

[1] En la krea parto, aperonta sekvanumere.

min, estis startonta el Moskvo, ni aranĝis la 12-an SEJM-Konferencon (la lastan, kiel evidentiĝis poste) apud Moskvo dum kelkaj tagoj antaŭ la starto.

Ni trovis por la Konferenco sufiĉe bonan lokon – la turistejon "Ŝĉerbinka" ne tro malproksime ekster la Moskva ringa vojo. (Poste tiun lokon ni uzis plurfoje: por OkSEJT-23 en 1981, por almenaŭ unu CRER k.a.). La tagordo de la Konferenco estis unuavide ordinara, sed ĝian tutan daŭron trapenetris la maltrankvilo pri la plua sorto de SEJM. Ni decidis reelektadon ne okazigi, nur fari kelkajn bezonatajn ŝanĝojn de SEJM-funkciuloj.

Antaŭ ol priskribi la kongresvojaĝon, mi ne povas ne mencii la tiaman sekretarion de la E-Komisiono ĉe SSOD Anatolij Berjoza. Pri li multe temis en la menciitaj libroj de Mikaelo Bronŝtejn kaj Vladimir Samodaj, kaj tiuj legantoj, kiuj ne konis lin persone, povis el tiuj libroj formi por si certan imagon pri Berjoza. Ĉi tie mi montretu lin sub mia vidangulo, kiu reliefigos iomete alian bildon.

La ĉefa kritika tezo kontraŭ Berjoza estis, ke li ne sciis la lingvon. Tio estis vera, sed… nur en la jaroj 1975-76, kiam lia oficado sur la E-posteno estis nur komenciĝinta. Poste, kiam li devis konstante atenti la E-gazetaron kaj fojfoje kontakti kun eksterlandanoj, li poiomete asimilis bazan lingvaĵon kaj laŭbezone eĉ parolis – lame, primitive, tamen ja parolis. Foje en mia ĉeesto al Berjoza telefonis grava E-aganto Violin Oljanov el Bulgario, kaj ili normale konversaciis: "Saluton, kamarado Oljanov" ktp, dum du aŭ tri minutoj. Berjoza ja povus, konsiderante ke "ĉiuj bulgaroj scias la rusan" (ankaŭ Oljanov sendube sciis), oportunamomente transiri al la rusa, sed li ne faris tion. Certe, kun sovetianoj li en Esperanto ne emis paroli, sed same estis pri ĉiuj sekretarioj antaŭ kaj post li.

Al mi Berjoza rilatis ĝenerale estime, fojfoje petante informojn pri io aŭ iu ne bone konata al li. Mi laŭpove kaj laŭeble pozitive donis al li tiajn informojn. Provokojn al denuncoj mi liaflanke neniam aŭdis. Antaŭ la Kongreso Berjoza ricevadis multajn leterojn de dezirantoj trafi la Kongreson; iam li embarasiĝis por decidi, kiun akcepti kaj kiun rifuzi. Foje mi lin vizitis, kiam li estis leganta vican tian leteron: "Jen skribas al mi Jurij Kivajev el Joŝkar-Ola. Ĉu vi konas lin?" Mi tuj diris ĉion sciatan pri Jurij, kiun mi konis persone kaj nur de pozitiva flanko. "Do, bona knabo?" – "Certe, bona". Kaj la kongresvojaĝo de Jurij estis decidita.

La vojaĝo al la Kongreso certe estis por mi plena de impresoj, des pli ke tio estis ne nur mia unua kongrespartopreno, sed eĉ ĝenerale la unua ellandiĝo. Nia vojaĝo daŭris du semajnojn: dum la unua ni konatiĝis kun Bulgario, kaj la dua estis dediĉita al la Kongreso mem. La karavano dum la tuta tempo konservis trigrupan strukturon: komence ni veturis fervoje ĝis

Sofio kaj lokiĝis en tri vagonoj (kaj same estis dum la revena vojo el Varna), poste la grupoj veturis samdirekte, sed en tri apartaj busoj. La enhoteligo ankaŭ estis laŭgrupa kaj foje diversaj grupoj eĉ okupis disajn hotelojn.

La sovetia kongresanaro ĝenerale estis sufiĉe varia kaj reprezentis plurajn respublikojn kaj regionojn. Tio videblis eĉ laŭ tiuj kelkaj homoj, kiuj daŭre estis apud mi dumvojaĝe. En la trajna kupeo kun mi najbaris moskva veterano Georgij Korotkeviĉ, la menciita Jurij Kivajev kaj Vladimir Derevjanko el Soĉi. Kaj en la hoteloj mia ĉambronajbaro estis estono Eduardo Raus.

Kiam nia karavano startis, tuj en iu kupeo amasiĝis pli ol deko da SEJM-anoj bone konantaj unu la alian, aperis botelo(j) da vino kaj granda dolĉega melono, venigita de Eŭgeno Perevertajlo. Ankaŭ Berjoza aliĝis al ni, promesinte paroli entrajne nur Esperante kaj poste klopodante sekvi la promeson. Gaja komenco antaŭsignis bonan dumkongresan humoron. Ni veturis tra Rumanio, kaj en kajo de Bukareŝta stacidomo nin renkontis granda grupo de rumanaj samideanoj.

Laŭitinere ni vizitis komence Sofion, poste estis Plovdiv kaj Gabrovo. Sofio aspektis kiel normala eŭropa ĉefurbo, ion eksterordinare okulfrapan mi ne rememoras. Multe pli interesa estis Plovdiv: krom la impona monumento "Aljoŝa", mi estis tre impresita de antikva amfiteatro kun bone konserviĝintaj sidlokoj, situanta profunde sub la nuna ternivelo. Mi eĉ skribis tiam en vojaĝlibreto ekspromtan duversaĵon: "Mi ĉiam en la vivo / memoros vin, Plovdivo!" – do vere, mi ĝis nun memoras. En Gabrovo ni vizitis Muzeon de humuro kaj satiro, kiu min seniluziigis: estis aro da strangaj karikaturoj tute sensubskribaj, kaj estis nekompreneble, pri kio tie oni ridu. Konstante en diversaj laŭvojaj lokoj ni havis varmajn renkontiĝojn kun reprezentantoj de la bulgar-sovetia amikec-societo, tio daŭris eĉ dumkongrese.

Dum la Kongreso ni mergiĝis en la amikan atmosferon de Esperantujo. La kapo turniĝis pro multego da konataj en Esperantujo figuroj (kun kiuj eblis konatiĝi kaj konversacii, sed mi ne ĉiam kuraĝis). Jen mi eniras lifton, kaj tie jam atendas eksupreniĝon Gaston Waringhien. Jen nia grupo tagmanĝas en restoracio, kaj ĉe apuda tablo apetite faras la samon William Auld. Jen mi promenas proksime de la kongresejo, kaj min haltigas Vilmos Benczik, petante foti lin kun grupo de amikoj. Similaj epizodetoj ripetiĝis ĉiutage.

La kongreso estis amasega (pli ol 4400 partoprenintoj), estis multege da paralelaj aranĝoj, mi ofte kuradis el iu ejo en alian por preterlasi nenion indan. Foje min kaptis Simo Milojeviĉ (memorŝajne ni jam estis konataj, ĉar

li pli frue vizitis Moskvon) kaj petis verki raporteton pri Esperantologia Konferenco por la revuo “Esperanto”, kiun li redaktis. Mi vizitis ĉiujn kunsidojn de tiu Konferenco kaj detale notis ĉion okazantan. La tasko estis des pli respondeca, ke tiu Konferenco estis la unua (ekde tiam Esperantologiaj Konferencoj okazadas en ĉiu UK). Do mi kompilis la raporton kaj jam septembre vidis ĝin publikigita en la ĉefa E-revuo.

Mian protokoleskan raporton ne eniris jena amuza epizodo. Krom raportoj pri certaj temoj, en la Konferenco estis pli-malpli liberaj disputoj. Dum iu tia disputo hungaro Antal Münnich donis ekzemplon de frazo, kiu laŭ li devus stumbligi komputilan programon por aŭtomata tradukado: “La malfermitaj pordoj estis fermitaj” – kaj la tuta salono ekridis, supozeble rememorinte iamajn disputojn pri “ata–ita”.

Krom oficialaj programeroj estis ankaŭ neformalaj. Foje kelkdek pli-malpli junaj kongresanoj diverslandaj kunvenis ie, memorŝajne sub larĝa ŝtuparo, por aŭskulti E-bardojn. Kantis Ĝanfanko Molle (Italio), Ĵak Lepŭil’ (Francio) kaj nia Mikaelo Bronŝtejn. Multaj registris la kantojn per porteblaj magnetofonoj kaj eble ĝis nun konservas la kasedojn kun la registraĵoj.

Varna, 1978. Mi kun Detlev Blanke kaj Boris Kolker apud la kongresejo. (La foto estas represita el “Heroldo de Esperanto”, n-ro 11-12 (1635-36), 01.09.78.)

Reveninte el la Kongreso, mi jam matenon de la sekva tago flugis al Dagestano – al OkSEJT-20, kie min jam atendis Natalia kaj la amika rondo de samideanoj. En la tendaro mi estis la sola kongresano, do en la programo estis mia rakonto pri la Kongreso. Ĉar la Kongresa fotoservo laboris operative, mi sukcesis akompane al la rakonto montri kelkajn impresajn fotojn. Kompreneble estis demandoj, kiujn mi klopodis respondi elĉerpe.

(*Daŭrigota*)

60 JAROJ DE E-AGADO EN KRASNODAR

E-agadon en niaj urbo kaj regiono fondis Vasilij Timofejeviĉ Najdin en 1925-1937. Li, post rekreo de E-movado ĝis la morto (en 1969), fakte estis estro de krasnodaraj esperantistoj. Najdin estis unu el nemultaj E-aktivuloj, kiuj ne trafis al siberiaj "tendaroj" pro sia E-aktiveco. En la 30-aj jaroj li instruis Esperanton en unu krasnodara teknikumo.

Post la 19-jara paŭzo E-movado en Krasnodar reaperis en 1956 kaj ĝis nun ne ĉesis. La unua tiama rondeto de esperantistoj, gvidata de docento J.S.Kravĉenko, funkciis ĉe la loka agrikultura instituto. En 1958 aperis nova E-rondeto ĉe Puŝkin-biblioteko, kaj de 1959 ĝis 1972 funkciis E-rondeto ĉe la urba Domo de sciencistoj: tie V.T.Najdin kaj M.P.Popov gvidis dum jaroj E-kursojn, kiujn finis Anatolo Ivasenko en 1966 kaj Sergeo Kocarj en 1968, E-aktivuloj kaj estraranoj de E-klubo ĉe Domo de instruistoj en 1972-1995.

En 1972 estis kreita oficiala E-organizaĵo, poste nomita je E.A.Bokarev, ĉe urba fako de kulturo de krasnodara urba plenumkomitato, kun la statuto, membrobiletoj, membrokotizoj. Poste ĝi fariĝis filio de ASE, tutsovetia E-organizaĵo.

En la 80-aj – 90-aj jaroj funkciis kelkaj E-kursoj, kiujn gvidis M.P.Popov, J.N.Danilĉuk, S.Kocarj, A.Ivasenko.

Dank' al M.Kocarj en Kubania Universitato estis organizita kurso de Esperanto ĉe la fakultato de sociaj profesioj. Estis organizitaj kelkaj E-renkontiĝoj SORER (Sud-Okcidentaj Rusiaj E-Renkontiĝoj): en Krasnodar, Soĉi, Novorossijsk, Gelenĝik kaj Rostov-Don.

Inter niaj E-veteranoj estis A.I.Punjko, esperantisto ekde 1908, kiu ricevis respondon je sia letero al Majstro L.L.Zamenhof en 1912. Krome nian klubon ofte vizitis kaj rakontis por la komencantoj multon interesan niaj veteranoj de E-movado rusia-sovetia: N.I.Tupijanc (esperantisto ekde 1914), V.Solovjov (ekde 1921), B.Dombrovskij (ekde 1930), J.A.Neĉipajevskij (ekde 1915), V.G.Borovskij.

En 1982-1987 estis organizitaj interesaj busaj vojaĝoj-renkontiĝoj al Soĉi, Abĥazio, Elbruso, Ĉeget-monto (Norda Kaŭkazo), ankaŭ al Krimeo

kun vizito de E-kluboj en Jalta kaj Sebastopolo. Dum tiuj 2-3-tagaj vojaĝoj krasnodaraj esperantistoj kaj lokaj klubanoj ĝuis la vojaĝojn mem al belaj lokoj apudaj, ankaŭ praktikis interparoli dumvoje nur en Esperanto.

Krasnodaraj esperantistoj aktive partoprenis E-tendarojn en Sovetunio kaj vizitis aliajn landojn, precipe la socialismajn, laŭ invitoj de siaj korespondamikoj, aŭ por partopreni en UK-oj aŭ aliaj internaciaj E-renkontiĝoj.

Ĉiujare ni publikigis en lokaj ĵurnaloj multajn artikolojn pri nia kaj la landa E-movado. Estis organizitaj kelkaj televidelsendoj pri Esperanto kaj nia klubo.

En 1972 nian rondeton ĉe Domo de sciencistoj vizitadis aktive Jozefo Horvath, la aŭtoro de E-lernolibro "Esperanto dum 30 tagoj", kaj Bertalan Farkaŝ, kiu poste fariĝis la unua hungara kosmonaŭto. Tiuj hungaroj studis tiam en loka aviadista altlernejo por eksterlandanoj.

De 1996 ĝis 2009 nia klubo ne havis konstantan ejon, uzis diversajn porokazajn ejojn aŭ renkontiĝis ĉe iuj hejme, en la parkoj, sed 10-12 malnovaj esperantistoj ne lasis E-agadon. En 2009-2012 en Domo de fervojistoj estis organizitaj E-kursoj sub gvido de A.Ivasenko, ankaŭ tie ni renkontiĝis. Ekde 2012 nia klubo renovigita havas propran kunvenejon ĉe novkreita urba Domo de Junularo, kie ni renkontiĝas dufoje monate dum dimanĉoj.

Ĉi-jare estas la 50-jara datreveno de esperantiĝo de la nuna prezidanto de Krasnodara Esperanto-klubo A.Ivasenko.

Anatolo Ivasenko, prezidanto de E-klubo nome de E.A.Bokarev (Krasnodar)

LA FENOMENO DE AKUZATIVO EN ESPERANTO KAJ IDO

La homo, unuafoje alpaŝanta al lernado de Esperanto post certigoj pri facileco kaj simpleco de tiu ĉi lingvo, almenaŭ unufoje ne konsentas kun tio. Tio ĉi okazas, kiam li komencas lerni la akuzativon. En plimulto da niatempaj hindeŭropaj lingvoj tiu ĉi gramatika fenomeno estas antaŭlonge perdita. Sed eĉ por homoj, parolantaj en la lingvoj, kie akuzativo konserviĝis ĝis nun, ne estas tiom facile dum mallonga periodo senriproĉe ekregi ĝin. Tial ne estas mirinde, ke ĉe multaj homoj, studantaj Esperanton, aperas demando: "Por kio Zamenhof inkludis la akuzativon en la lingvon, kiun li kreis? Ĉu ne estus pli bone aranĝi tute sen ĝi?" Por respondi la demandon, necesas klarigi, sur kia intelekta bazo estis konstruita Esperanto.

La intelekta bazo de Esperanto. La kreinto de Esperanto, *Ludovik Zamenhof (1859-1917)* naskiĝis en la familio, en kiu ses generacioj de lia prauloj estis sciuloj pri lingvoj. En la familio oni parolis en kelkaj lingvoj, sed plejofte – en la rusa. Oni opinias, ke Zamenhof frue iĝis poligloto kaj diversgrade posedis 12 lingvojn. En tiun ĉi "oran dekduon" eniris la hebrea, la rusa, la pola, la germana, la franca, la angla, la latino, la helena, la jida, la itala, la litova kaj la slavona. La kategorio de la kazo en tiu ĉi listo ne ekzistas nur en kvar lingvoj: en la franca, la angla, la itala kaj la hebrea. El la ceteraj ok lingvoj sep estas hindeŭropaj kaj nur unu, la jida, – estas semida lingvo.

En 1881 estis eldonita brila libro de talentega, sed antaŭtempe forpasinta lingvisto *Aleksandro Popov (1855-1880)*[1], kiu skribis, ke ĉiuj hindeŭropaj kazoj dividiĝas je du tavoloj: la unua tavolo entenas la vokativon, la nominativon kaj la akuzativon. Ĉiuj restaj kazoj apartenas al la dua tavolo. Ĉe tio la vokativo okupas la lastan lokon en la trio de "la unua tavolo". Finfine, plejofte ĝuste la vokativo eliĝis el uzado, kaj en plimulto da modernaj hindeŭropaj lingvoj ĝi jam forestas. Tial en la modernaj lingvoj de nominativa ordo specialan gravecon havas duopo de kazoj: "nominativo-akuzativo". Tamen ankaŭ inter la paruloj daŭras konstanta kruela lukto.

En antikveco la sistemo de hindeŭropa deklinacio inkluzivis *ok kazojn* (nominativon, vokativon, akuzativon, kaj ankaŭ genitivon, dativon, instrumentalon, lokativon kaj ablativon). Do kio restas de ili? Ni vidu tion ĉi en la ekzemploj de kelkaj lingvoj.

La neniiĝo de kazoj en la helena lingvo. La helena lingvo perdis tri

---

[1] *Попов А.В.* Сравнительный синтаксис именительного, звательного и винительного падежей в санскрите, древнегреческом, латинском и других языках. Изд. 2-е – М.: Книжный дом «ЛИБРОКОМ», 2012 – 320 с.

kazojn el la ok, tio estas ĝi konservas nur kvin: nominativon, vokativon, akuzativon, genitivon kaj dativon. En la nominativo la vortoj en singularo en ĉiuj tri genroj finiĝis je ***n*** **(*ν*)**. Ekzemple:

«kampo» (virgenro): αγρος (nom.) – αγρον (ak.);
«parolado» (ingenro): διαλεκτος (nom.) – διαλεκτον (ak.);
«farmacaĵo» (neŭtra genro): φαρμακον (nom.) – φαρμακον (ak.).

Krom tio, la helena lingvo havis difinan artikolon (nedifina artikolo ankoraŭ ne ekzistis). En la akuzativo el ĉiuj tri genroj la difina artikolo havas jenan aspekton:

τον (virgenro) – την (ingenro) – το (neŭtra genro).

Notu, ke artikolo de la neŭtra genro estis jam senigita je la fina sono ***n*** diference de virgenro kaj ingenro, kio akordiĝas kun la tendencoj en ceteraj hindeŭropaj lingvoj.

La novgreka lingvo perdis dativon. Restis kvar kazojoj, inter ili la akuzativo. Ĉe tio la kazaj finaĵoj de substantivo konsiderinde simpliĝis: la postsignoj de la sono ***n*** en la akuzativo de *vortoj mem* malaperis. La bazan kazan signifon komencis porti la difina artikolo, kiu krom tio estis kompletigita per la nedifina artikolo. La sono ***n*** en akuzativo de virgenro kaj ingenro de singularo konserviĝis nur en la artikolo mem. Ekzemple, la modernaj novgrekaj vortoj en la akuzativo aspektas jene:

«studento» (virgenro) – το(ν) φοιτητη;
«koro» (ingenro) – την καρδια;
«infano» (neŭtra genro) – το παιδι.

En la slavona lingvo la karaktera por hindeŭropa lingvo sono ***n(m)*** en akuzativo malaperis multe pli frue ol en latinidaj lingvoj:

daru***n*** → дар [donaco];
gosti***n*** → гость [gasto];
sunu***n*** → сын [filo].

Do, en modernaj slavidaj lingvoj[1] (kaj en iliaj plej proksimaj parencoj – baltaj lingvoj: la litova kaj la latva) formiĝis unika situacio: la sistemo de kazoj daŭre ekzistis en sufiĉe evoluinta formo. Sed la karaktera sono ***n (m)*** por akuzativo de singularo malaperis, lasante iujn malklarajn postsignojn en formo de nazaloj ***ą, ę***, en la pola, kaj praktike nekapteblajn fonetike nazalojn ***ą, ę, į*** kaj ***ų*** – en la litova lingvo[2].

---

[1] Escepte de la bulgara lingvo, kie la tradicia kaza sistemo estis praktike perdita.

[2] Se en la pola lingvo la nazalo en la akuzativo konserviĝas ĝis nun, en la litova lingvo ĝi restis nur en formo de specialaj grafikaj signoj. Fakte la perdo de la nazalo finiĝis proksimume al la 16-a jarcento kaj kongruis kun la kompleta asimiliĝo de la balta lingvo de antikvaj prusoj per la germana lingvo.

En la ĝermanaj lingvoj okazis similaj procezoj. Sojle de la 3-a jarcento de nia erao la lingvaj diferencoj inter apartaj grandaj grupoj de ĝermanoj iĝis jam tiagrade konsiderindaj kaj profundaj, ke por komenco de tiu ĉi periodo oni ne povas paroli pri "ĝeneral-ĝermana lingvo", sed necesas distingi "apartajn ĝermanajn lingvojn".

Antaŭ la 10-a jc. en la ĝermanaj lingvoj laŭgrade formiĝas la **sistemo el kvar kazoj**, kiuj atingis nuntempon nur en la germana kaj en la islanda lingvoj (nominativo, genitivo, dativo kaj akuzativo). Same kiel en la helena lingvo, la baza ŝarĝo je diferenco de kazoj transportiĝis al la artikolo, kvankam la vorto mem iomete pli aktive partoprenis en tiu ĉi procezo.

Malapero de kazoj en la latino. La latino havis ses vivajn kazojn: tri gramatikajn – 1) nominativon, 2) vokativon kaj 3) dativon; kaj ankaŭ 4) genitivon, 5) akuzativon kaj 6) ablativon. Tiamaniere, la latino jam antaŭ komenco de historia periodo reduktis la nombron de kazoj, forĵetis la plej komplikajn atributojn de la antikva hindoeŭropa formacio, kio atestis pri bazoj de formacio propre latinida. En la klasika latina lingvo, diference de la helena, ankoraŭ ne formiĝis artikoloj, sed tamen la akuzativo havis klare distingeblan konsonanton ***m***[1]:

rosă – rosa***m***;
dominus – dominu***m***;
puer – pueru***m***.

Dum la periodo de la vulgara (popola) latino okazas rapida atrofio de la kaza sistemo kaj aperas artikoloj. En rezulto de dramaj kaj impetaj ŝanĝoj en novaj latinidaj lingvoj okazas laŭgrada malapero de kazoj (escepte de la rumana lingvo). Ĉe tio, diference de la helena, la artikoloj ankaŭ perdadas la kazan sistemon. Tial en ĉiuj modernaj latinidaj lingvoj la karaktera signo de la akuzativo (***n*** aŭ ***m***) senspure malaperas. En procezo de simpligo de la kazaj formoj en la vulgara latino konserviĝis nur du kazoj: la nominativo kaj la akuzativo. La akuzativo akompanata de diversaj prepozicioj plenumis ĉiujn funkciojn de la perditaj kazoj, kvankam ekde perdo de la fina konsonanto ***m*** en singularo forviŝiĝis, finfine, ankaŭ la difirenco inter la nominativo kaj la akuzativo.

Malapero de kazoj ĉe formado de la franca lingvo. Nun eĉ ne en unu latinida lingvo konserviĝis kazoj (krom la rumana, kie ili estas tri: nominativo, akuzativo kaj dativo). En la franca lingvo okazis ege interesaj proce-

[1] Rimarkindas, ke dekomence dum la kreado de Esperanto Zamenhof kiel la finaĵon de la akuzativo elektis, kiel en la latino, –***m.***

zoj, kiujn en 1867 priskribis *Auguste Brachet (ogjúst braŝé, 1845-1898)*[1].

Li skribas, ke strebado faciligi kaj redukti la nombron da kazoj evidentiĝis frue en la popola latina lingvo. La kazoj esprimis ege delikatajn nuancojn de la penso, sed la kruda menso de la barbaroj ne estis kapabla penetri en tiajn delikatajn nuancojn. Ne havante kapablojn al asimilado de tia dokta kaj komplika aparato de la latina deklinacio, la barbaroj elpensis alian, pli konvenan al ili.

Ekde la 5-a jarcento, t.e. longe antaŭ apero de la unuaj skriboj en la franca lingvo, la popola latina lingvo reduktis al du novaj kazoj ses malnovajn kazojn de la literatura latina lingvo: la nominativo por indikado de la subjekto, kaj por komplemento ĝi selektis la akuzativon, kiel la plej ofte renkontiĝantan en parolado. Ekde tiu tempo la latina konjugacio aperis en jena aspekto: la kazo de la subjekto – ***murus***, ka la kazo de la komplemento – ***muru-m***.

Kiam la popola latina lingvo iĝis la franca, la deklinacio kun du kazoj restis en ĝi kaj servis kiel la bazo de la franca gramatiko dum la unua duono de la mezepoko. La akuzativo ekzistis ĝis la 13-a jarcento, sed subite malaperis en la 14-a jarcento, cedinte la lokon ekde la 15-a jarcento al la moderna strukturo. Tiamaniere la lingvo latina ĉe falo de la okcidenta Romia Imperio, perdinte el la ses kazoj kvar, iĝis la antikva franca kun du kazoj kaj de la sinteza lingvo transiris al la lingvo duone sinteza. En la 14-a jarcento la deklinacio kun du kazoj malaperis el la lingvo franca kaj cedis la lokon al unu kazo, kiu ekzistas ankaŭ nun. Tia perdo de la deklinacio devigis la lingvon transiri el la stato duonsinteza, en kiu troviĝis la antikva franca lingvo, al la stato de analiza moderna lingvo, drame maljunigis la antikvan francan lingvon kaj faris abruptan limon inter ĝi kaj la plej nova lingvo.

Brachet markis, ke estus ege infane priplori la perditan deklinacion. Utila siatempe dum la vojo de moviĝo de sintezo al analizo, la doundeklinacio devis malaperi simile al tio, kiel malaperis ses-kaza deklinacio. La naturo neniam iris per rapidaj saltoj, sed atingas ĉion per malrapidaj kaj pogradaj modifoj. En la transiro de la latina al la franca lingvo la deklinacio kun du kazoj servis kiel peranto inter la seskaza deklinacio de la latina klasika lingvo kaj la formo de la plej nova franca lingvo.

Tia ĉi edifa historio pri modifo de la latino al la antikva franca kaj poste – al la moderna franca lingvo estas interesa por ni, almenaŭ de du vidpunktoj.

---

[1] Vd.: *Браше О.* Историческая грамматика французского языка (*пер. с фр.*) – М.: Едиториал УРСС, 2010. С. 38-39.

Unue, la modernaj kritikantoj de Esperanto asertas, ke eĉ ne en unu lingvo ekzistas la kaza sistemo de du kazoj: la nominativo kaj la akuzativo. La antikva franca lingvo tiun argumenton konvinke refutas. Tie ĉi la dukaza sistemo ekzistis dum kompleta jarmilo: de la 5-a ĝis la 14-a jarcento!

Due, *Auguste Brachet* konvinke montris kio sekvigis la kaŭzon de la redukto de sufiĉe stabila dukaza sistemo al unukaza (tio estas sistemo sen kazoj). La kaŭzo de tio estis ĥaosa kaj radikala ŝanĝiĝo de la sistemo de la deklinacio kaj de la sistemo de la nombro. La kaŭzo pro tio estis ĥaosa rompado de la sistemoj de konjugacio kaj de nombro. Sed en Esperanto tiuj ĉi sistemoj ne portas potencialon de la detruo, ĉar ili estis kreita plane kaj unuforme. Pro tio, estis necesa jarmilo por neniigo de dukaza sistemo en *kondiĉoj de gramatika ĥaoso de la antikva franca lingvo, sed por la plana Esperanto tia danĝero praktike ne ekzistas.* Alivorte, la dukaza sistemo de Esperanto povas malaperi nur tiam, kiam por tio estos centraliza decido: imanente Esperanto ne posedas premisojn por ruinigo de la dukaza sistemo.

Almenaŭ kritikantoj de Esperanto opinias, ke ekzistado de la akuzativo en Esperanto kreas grandajn malfacilaĵojn por ĝia lernado. Interesan solvon de tiu situacio trovis adeptoj de Ido. En tiu ĉi lingvo la formo de akuzativo *preskaŭ ne uziĝas*. Do en plimulto de okazoj oni uzas rektan vortordon:

Subjekto → verbo → objekto.

En tiu ĉi okazo la vortordo mem (kiel en la plimulto de modernaj hindeŭropaj lingvoj) montras la regadon de subjekto. Tamen en specialaj okazoj, kiam oni devas emfazi tiun regadon, la formala akuzativo uziĝis. Kaj la montro de la akuzativo estas ankaŭ la postvokala litero ***n***. Vere, tia sprita solvo de la problemo ege faciligas lernadon de la lingvo. Tamen tiamaniere perturbiĝas la ĉefa regulo de Esperanto: malesto de esceptoj.

Zamenhof enkondukis la akuzativon, konsiderante la hindeŭropajn tradiciojn, por aldoni al sia kreaĵo kroman elastecon kaj elegantecon. Kompreneble, ke sur nuna etapo de la evoluo de Esperanto ni ne rajtas retroiri de la reguloj de Zamenhof kaj sekvi ekzemplon (eĉ interesan) de idistoj. La problemon devos solvi estontaj generacioj de esperantistoj, kiam la internacia lingvo ricevos ĉies aprobon kiel la monda rimedo de komunikiĝo. Kaj tiu ĉi futuro venos.

Aleksandr Seliŝĉev (Sankt-Peterburg)

LINGVA FESTIVALO EN IĴEVSK

En Iĵevsko, la ĉefurbo de Udmurtio, la 12-an de marto 2016 okazis lingva festivalo. Ĝi pasis en la urbocentro, en la Internacia Orient-Eŭropa Universitato. Estis prezentitaj pli ol 20 lingvoj, inkluzive Esperanton, 7 prilingvaj prelegoj kaj riĉa porinfana programo. La ideo de la festivalo estis ne nur montri la diversecon de la lingvoj en la mondo, sed, laŭ vortoj de la ĉefa organizinto Aleksej Ŝkljaev, atentigi pri la multlingveco en Udmurtio mem: "Dum la tuta historio de nia regiono oni parolis ĉi tie tri lingvojn: la udmurtan, la tataran kaj la rusan. Sed, bedaŭrinde, la tendeco estas, ke oni parolas nur la rusan kaj ne interesiĝas pri la naciaj lingvoj de nia respubliko. Nia lingva festivalo estis organizita por ke pli da homoj interesiĝu pri siaj gepatraj lingvoj, lernu kaj konservu ilin."

Dum la festivalo kelkaj alilandanoj, loĝantaj nun en Iĵevsko, faris prezentojn (aŭ kontribuis al ili) de siaj naciaj lingvoj: la ĉina, la araba, la indonezia, la finna, la hungara. Kune kun lokaj specialistoj ĉe la festivalo prelegis ankaŭ lingvistoj, venintaj el Moskvo. Ili rakontis pri ok lingvoj, inter kiuj estis lingvoj de aliaj popoloj de Rusia Federacio (la monto-maria kaj la erzja lingvoj).

Krom lingvoj dum la festivalo okazis prelegoj pri ĝenerala lingvoscienco fare de kieva lingvisto Artjom Fedorinĉik – la motoro de la Iĵevska festivalo. En tri el la kvin liaj prelegoj estis tuŝitaj la temoj pri stato de naciaj lingvoj en la mondo kaj en Rusio. Apartan atenton elvokis la prelego de la loka lingva aktivulo Sergej Beĥterev "La jura statuso de la udmurta lingvo".

Esperanton en la festivalo prezentis Irina Gonĉarova, la direktoro de la Moskva Lingva Festivalo, kunordiganto de la Moskva Esperanta Asocio MASI. La kialojn de sia veno al Iĵevsk ŝi klarigis jene:

"La ĝenerala kialo estas ke mi traktas lingvajn festivalojn ne kiel unuopajn diverslokajn eventojn, sed kiel komunan socian movadon, entreprenatan de samideanoj, kiuj celas ne propran profiton, sed kleran kaj konscian kreskon de sia homa medio. Mi alte taksas la strebojn de lingvemuloj rakonti al interesitoj pri siaj ŝatataj lingvoj. Ankaŭ por mi ajna lingva festivalo estas tereno por popularigi la internacian lingvon Esperanto, neŭtralan kaj justan.

Do, mi ĉiam pretas ne nur morale kaj konsile subteni kie ajn popolajn volontulajn lingvajn festivalojn, sed ankaŭ laŭeble kontribui ties programojn helpe de la moskvaj prelegantoj. Kaj kiam mi eksciis de Artjom Fedorinĉik pri la LF en Iĵevsk, mi tuj decidis veni – por esprimi mian estimon kaj subtenon al tiu ĉi iniciato.

La speciala kialo por Iĵevsk estas ke mi traktas la festivalojn en rusiaj respublikoj aparte gravaj. Ja ĉi tie ni povas pleje emfazi la bazan ideon de la lingvaj festivaloj laŭ mia koncepto de tiuj: “Esperanto estas lingvo la dua post la *gepatra* kaj komuna por ĉiuj”. La gepatraj lingvoj de multaj nacioj en pluraj rusiaj regionoj, eĉ en respublikoj, estas danĝerigataj de la titola nacia lingvo, kaj la emfazo de esperantistoj pri prioritato de la gepatra lingvo por ĉiu homo estas plej ĝustaloka ĉi tie.

Ambaŭ trajtoj – la esperantismo kaj la nacieco – plej evidente sin prezentas en la ĉuvaŝa lingva festivalo. Estus bonege, se la Iĵevska lingva festivalo sekvus la ĝustan modelon de LF en Ĉeboksari.”

Indas mencii, ke post la rakonto pri Esperanto ekformiĝis grupo de dezirantoj lerni la lingvon en la senpaga kurso, kiu baldaŭ ekfunkcios en Iĵevsk <https://vk.com/esperanto_izhevsk>. Skajpe la grupon subtenados Irina Gonĉarova. Aliĝu, iĵevskanoj!

La lingva festivalo en Iĵevsk estis plene sukcesa. Tion atestas ankaŭ la fakto, ke la aktivuloj ne emas halti, sed jam aktive preparas la Unuan Tendaron de la Udmurta Lingvo <https://vk.com/udmkyl_camp>, por kiu la bazon liveras Jevgenija Lekomceva – unu el la tri organizantoj de la Iĵevska lingva festivalo.

Roman Mutin (Iĵevsk), Irina Gonĉarova (Moskvo)

BULTENO DE REU

№ 85, Aprilo 2016

Alvoko al la kluboj kaj individuoj
Karaj ĉiuj, jam aprilo finiĝas – ĉu ne venis la tempo pagi viajn tre modestajn kotizojn al REU? *Via Estraro*

Eventoj

Festivala printempo

Printempo estas la sezono de Lingvaj Festivaloj. Kontraste al aŭtuno-vintro, kiam pasas nur tri (la Ĉeboksara, Moskva kaj Novgoroda), en aprilo-marto okazas kvin: en Iĵevsko, Uljanovsko, Minsko, Sankt-Peterburgo kaj Kalugo.

La 3-a Lingva festivalo en Iĵevsko <https://vk.com/linguafest2016> okazis **la 12-an de marto** 2016, post dujara paŭzo, laŭ la iniciato de la kieva lingvisto kaj esperantisto Artjom Fedorinĉik, kiu studis la udmurtan lingvon en la respublika ĉefurbo kaj sukcesis reentuziasmigi la ĉefan festivalan organizanton Aleksej Ŝkljaev kaj aliajn udmurtajn inteligentulojn. (legu pli detale pri la festivalo en la p. 27-28)

La 14-a Internacia Lingva Festivalo "Multaj popoloj – unu mondo" en Uljanovsko pasis **la 26-an de marto** 2016. Laŭ la abundaj, viglaj kaj laŭdaj raportoj kaj pozitivaj impresoj en la koncerna grupo de VKontakte <https://vk.com/club12638654> la festivalo estis tre amasa kaj sukcesa, ĝi memorigas tiun en Ĉeboksari de ties frua historio, sed, ŝajne, estas eĉ pli subtenata de la oficialaj instancoj (pri kio atestas almenaŭ la listo de la salutintoj). Kiel organizantoj estas menciitaj la Uljanovska ŝtata pedagogia universitato "I.N.Uljanov", Provinca scienca biblioteko, Palaco de la Libro kaj Uljanovska Esperanto-klubo. En la programo enestas renkontiĝo kun la loka Esperanta klubo, sed ĉu okazis la aranĝo aŭ iu alia rakonto pri Esperanto, aŭ iel alimaniere estas prezentita Esperanto, scias nur la uljanovskaj esperantistoj, kiuj, bedaŭrinde, neniun invitadas al sia festivalo kaj nenion raportas pri ĝi – nek al festivalanoj de aliaj urboj, nek al esperantistaro.

La 4-a Lingva Festivalo en Minsko <https://vk.com/minsklingfest> denove feliĉigis la partoprenintojn **la 27-an de marto**. Verdire, estas mia plej ŝatata lingva festivalo el ĉiuj, inkluzive la Moskvan. Mi traktas tiun festivalon nia, ĉar ĝin organizas zorge laŭ la modelo de la Moskva LF mia "dekstra mano" minskano Anton Somin, kiu sukcesis logi al la festivala movado la brilan teamon de junaj sciencistoj – lingvistoj, historiistoj, artesploristoj de la Belorusa ŝtata universitato. La 4-a Minska proponis al ĉirkaŭ 900 vizitintoj 60 belegajn eventojn. Malfacilas trans-

doni, kiom granda, kara kaj kora festo tio estas! Tamen mi raportu ĉi tie nur pri niaj celagadoj. Mi dufoje prezentis Esperanton en plenplena klasĉambro sume por 60 dankemaj aŭskultantoj. Inspirita de la sperto en Iĵevska LF, mi proponis al la interesitoj lasi siajn kontaktojn. Enskribiĝis 17 homoj, mi lanĉis en vK grupon "Эсперанто в Минске", al kiu aliĝis 25 dezirantoj ricevi plian informon pri Esperanto.

La 10-a Lingva Festivalo en Sankt-Peterburgo <http://festivalo.ru/>, <https://vk.com/festivalospb>, organizata de la fama esperantisto Vjaĉeslav Ivanov – **la 17-an de aprilo** – havas siajn adorantojn kaj tradicie multajn lingvoprezentantojn el Moskvo. En la plano estas 45 programeroj, inter kiuj prezentado de Esperanto de Vjaĉeslav kaj Esperanta konversaciejo de Mikaelo Kolodin. Pli detale raporti pri la evento dume ne eblas. Tamen ni ĉiuj gratulu la festivalon okaze de la impona jubileo!

La 5-a Lingva Festivalo en Kaluga <https://vk.com/club38269849> fakte estas Lerneja (por lernejanoj), kunvenigos la lingvemajn gejunulojn **la 23-an de aprilo**. Ĝin organizas la Administrejo de mezgrada edukado de la urbo Kaluga. Ankaŭ tiu ĉi LF estas ido de la Moskva Festivalo: inspirita de la Moskva kaj jam la kvinan jaron de la Moskva fortege subtenata. Nun (kiam mi skribas ĉi liniojn) estas finkompilata la granda teamo de la lingvaj prezentantoj el Moskvo. Kiel ĉiam, mi iras tien por rakonti pri Esperanto. Pliajn detalojn mi volonte liveros al vi post kiam la festivalo pasos. Kaj nun nia kroma zorgo estas pensi, kiel inde gratuli la kaluganojn okaze de ilia unua jubileo.

Konklude ni kore gratulu ĉiujn esperantistojn-organizantojn kaj kontribuantojn de la Lingvaj Festivaloj, kiuj estas la plej efika tereno por popularigo de Esperanto en eksteresperanta mondo! Ni esperas, ke la evidenta disfloro de la Festivala Movado en Rusio inspiros aliajn esperantistojn lanĉi lingvajn festivalojn en siaj urboj. La subtenon flanke de la Moskva Lingva Festivalo ni garantias!

Irina Gonĉarova, direktoro de la Moskva Lingva Festivalo
<http://www.lingvafestivalo.info>, <https://vk.com/mlfest>

Kvina Internacia KER-sesio en Moskvo

La 16-an de aprilo 2016 en Moskvo sukcese pasis la 5-a Tutmonda KER-ekzameno. Fakte en Moskvo la sesio estis organizita jam la 6-an fojon. Antaŭ kelkaj jaroj ni havis eksterordinaran ekzamenon por granda grupo de dezirantoj, kiun akceptis K.Kováts kaj R.Corsetti.

Ĉi-foje ni havis eblecon organizi la sesion en la perfekta ejo de la Centro de pedagogia majstreco. Hela, vasta klasĉambro kun dudeko da tabloj kaj seĝoj bonege influis kaj instigis la laborhumoron. La skriban ekzamenon partoprenis 10 diversaĝaj personoj el Moskvo, Apudmoskvo kaj Kazano. La unuan fojon ni havis en la konsisto de ekzamenatoj 2 lernejanojn, unu el kiuj kuraĝis por la nivelo C1.

La ekzamenatmosfero estis trankvila, hejmeca, tre agrabla kaj entuziasmiga. Kvankam ekstere forte pluvegis, eĉ neĝis, la humoro estis tute bona. La koverton kun testoj solene malfermis Nikolao Gudskov, la partoprenantojn gratulis kaj detale informis pri la ekzamenproceduro Svetlana Smetanina.

Dum la ekzameno eblis kafumi, teumi, manĝeti diversajn abundajn bongustaĵojn. Tamen ĉiuj laboris tiom serioze kaj diligente, ke neniu eĉ aliris la manĝotablon dum la unuaj 2 horoj. Ĉiuj partoprenantoj finis siajn laboraĵojn antaŭ la indikita tempo, kvankam ĉi-jare la testoj por ĉiuj tri niveloj (B1, B2, C1) estis multe pli komplikaj ol en antaŭaj sesioj.

Post la fino de la ekzameno Irina Gonĉarova intervjuis la partoprenintojn pri la ekzameno, impresoj, malfacilaĵoj, ktp. por la filmeto de la "Esperanto – Pervij kanal". Iom lacaj, sed kontentaj kaj esperantaj pri la sukcesa ekzameniĝo, jam en suna posttagmezo, ni disiĝis.

Svetlana Smetanina, ĉeforganizanto de la KER-sesio

Niaj jubileoj

Viktor Aroloviĉ – 70-jara!

09.03 en moskva E-klubo "Lev Tolstoj" oni festis la duoblan jubileon de fama aktivulo Viktoro Aroloviĉ: 70-an naskiĝtagon kaj 50-jariĝon de lia e-isteco. Ĉeestis 14 personoj.

Komence Viktoro voĉlegis parton de siaj rememoroj – pri la junaĝo kaj veno al Esperanto, pri siaj unuaj spertoj en tendaro (plena teksto estas publikigata en REGo). Kelkaj ĉeestantoj eldiris proprajn rememorojn, ligitajn kun Viktoro.

Poste sonis versaj gratuloj de ĉeestantoj: Klara Ilutoviĉ, Valentin Melnikov, Nikolao Gudskov, Ludmila Novikova, Irina Gonĉarova + MASI. Estis voĉlegitaj

gratulmesaĝoj venintaj de uralanoj, Boris Kolker, Povilas Jegorovas kaj Tatjana Auderskaja. Viktoro ricevis donace broditan tukon kun vortoj de Zamenhof, ankaŭ aliajn donacojn.

Ĉiuj ĥore kantis "Esperon" (de Paĥmutova-Dobronravov), siatempe brile tradukitan de Viktoro, poste gratulkanton: Mikaelo Bronŝtejn verkis novan tekston por la konata melodio de "Verda ĝardeno". Sekvis alia gratulkanto de Mikaelo Bronŝtejn, plenumita de Mikaelo Povorin. Galina Staneŝnikova plenumis la romancon "Mateno nebula".

Post paŭzeto okazis regalo: luksa jubilea torto en formo de ciferoj "70", ornamita per verdaj steloj kaj surskribo "Ni vin amas!"; estis ankaŭ aliaj dolĉaĵoj kaj fruktoj; krom teo – kiel kutime en niaj klubaj festoj – por dezirantoj disponeblis hejma vino de Nikolao Gudskov.

Ankoraŭfoje gratulojn al Viktoro!

V i estas homo tre unika:
I ntelektulo bril-efika,
K un vasta kaj profunda klero,
T alenta en scienca sfero,
O rganizanto striktfervora,
R EU-agad-regulatoro,
O rdobservanto plej skrupula…

A kceptu niajn korgratulojn,
R espekton kaj admiron niajn
O maĝe al meritoj viaj
L ige kun via jubileo!
O kazas granda gajo festa!
V iaj amikoj ĝin ĉeestas.
I nundas vin per vortoj, kantoj.
Ĉ iamu Vi kaj Esperanto!!!

Ludmila Novikova

Sepdek printempoj

Muziko de Mikaelo Povorin, teksto de Mikaelo Bronŝtejn

Tagon postkuras la tag',
Horon postflugas la hor',
Plag' malfortiĝas al blag'
En tempoiro, kara Viktor'.
Agon postulas la cel',
Spronas impeton labor',
Kaj kontentiĝ' venas de l'
Bona rezulto, kara Viktor'.

Refreno
En viv-rivero pena travad' –
Sepdek printempoj en la movad',
Sepdek printempoj – la sama kreiv',
Sepdek printempoj, sepdek printempoj –
pluiru antaŭen la viv'!

Vivon instigas bezon’
Iri laŭ certa vektor’:
Gravas amikoj, ne mon’,
Vi tion spertis, kara Viktor’.
Esperantista medi’,
Kaj televida rumor’
Ĉiam bonvolis al vi –
Ja laŭmerite, kara Viktor’!

Refreno

Nekontestebla talent’,
Neelĉerpebla humor’
Kune kun la humur-sent’
En vi kuniĝis, kara Viktor’.
Jen do racia resum’
Por bondeziro el kor’:
Restu aktiva vi dum
Pliaj jardekoj, nia Viktor!

Refreno

* * *

Ĉu vi bluan birdon kaptadis
permane? –
Demand’ retorika, ĉar jam veterane
blubirdan raguon kun bona humoro
meritas ekfrandi amiko Viktoro,
ĉar li dum jardekoj de lerta kovado
produktis blubirdojn por nia movado.

Refreno
Jen, en Verda Ĝarden’, jubilu en gloro
amiko Viktoro, amiko Viktoro!

Se nin ne perfidas stumblanta memoro,
ekagis aktive amiko Viktoro
en fora pratempo mamuta kaj saŭra,
dum viv’ malfacila, sed ja senbedaŭra,
feliĉa, ĉar juna kaj tre multeventa
kun foje imuna ploreto momenta.

Li kreskis rapide, ĉar havis racion:
prezidis, redaktis, eĉ gvidis sekcion.
Kun lert’ eskapinte de l’ sperta toporo,
post la kulturigo prosperas Viktoro
en studoj, en ludoj, en zorgoj redaktaj,
amikaj rilatoj, aferaj kontaktoj.

Fluegas la jaroj. En faroj, en kreo
Viktoro pli-malpli jam ĉe l’ jubileo.
Do ni per aplaŭdoj, salutaj mansvingoj
lin benu por novaj sukcesaj atingoj,
kaj la amikar’ unuiĝu en ĥoro
por kanti “Hura-a-a!” al amiko
Viktoro.

Mikaelo Bronŝtejn

Al la jubileo de Viktoro Aroloviĉ

Viktoro, vi estas unika persono,
Paŝanta enciklopedi’.
Bonsanon, bonfarton kaj bonan hunoron
Ni kore deziras al vi!

La jaroj galopas, ŝanĝiĝas la baroj,
Aliaj rifuzas eĉ de neŭtraleco,
La homoj ne plu restas samideanoj,
Sed firme Viktoro plu sekvas la leĝojn.

Tra tuta epoko de nia Movado
Vi estas model’ de fidela servado
Plej ĝusta, plej justa kaj plej akurata,
Gardanto de scioj pri faktoj kaj datoj.

Pro via sindona preciza laboro
De SEJMa apero ĝis REU-disfloro,
Pro via stabila agada fervoro
Ni kore vin dankas, amiko Viktoro!

Je la nomo de MEA MASI, Irina Gonĉarova

Al Viktoro Aroloviĉ

De Viktoro Aroloviĉ naskiĝtag'
estas festo por la klubo kaj movado.
Malfacile eĉ kapteblas por imag' –
kiom multe faras li sur verda pado.

Pri etoso lingva zorgas en tendar',
organizas, kaj instruas, kaj konsilas,
historion gardas... ĉiu lia far'
Vere gravas, kaj sufiĉe malfacilas.

Intelektaj ludoj, la saĝula rond' –
tre sukcesa estas li partoprenanto.
Al demand' komplika venas tuj
respond'...
Jen sentruda fam' pri lingvo Esperanto.

De aferoj gravaj plenas ĉiu hor'.
Laboremas li, kaj ĉiam viglas june.
Kiel oni diras – vivu do, Viktor',
Ĝis cent dudek jaroj! Ni gratulas kune!

Valentin Melnikov

Volapukado

Fragmentoj el nekonata poemo de Homero

Ve al popol' kompatinda! Alvenis la plag' grandioza,
Inter la plagoj diversaj pli granda aperi ne povas,
Kiam alrampas terura serpento-boao abisma,
Timon elvokas kaj ĉiun estaĵon, kaj eĉ elefantojn forglutas,
Onde volviĝas la korp', ĝia nom' abomena, malbela
Rulas la langon pro tim' kaj incit'… estas ĝi Volapuko.

…**A**re herooj alvenis al la renkontiĝ' por batalo
Rajde, piede aŭ ŝipe – laŭ loko de ĉies deveno,
Ore brilante per bronzaj fortikaj kirasoj,
Lumo rebrilas de kaskoj, kaj ŝildoj,
kaj glavoj…
Oni parolis, ke l' monstr' Volapuk'
ne venkeblas –
Vane! Alrajdis hero' kaj enigis la
lancon en koron,
Igis la drakon tuj morti por plena
forgeso!
Ĉiuj admiras la agon de l' glora
venkinto!

La antikvan papiruson
malĉifris Olda Koboldo

PRI SEMJON VAJNBLAT

Okaze de lia 80-jariĝo 30.03.2016

Odeso estas unu el la plej ŝatataj miaj urboj. Mi ĉiam uzas okazon por viziti la "perlon ĉe la maro", kiel poeto nomis tiun ĉi ĉarmegan urbon. Dum ĉiu mia vizito mi strebas renkontiĝi kun la odesaj geesperantistoj. Dum mia lasta vizito al Odeso en aŭgusto 2013 mi partoprenis en la kunveno de la odesa E-klubo "Blanka akacio", kiun gvidas Semjon Vajnblat.

Dum multaj jaroj mi estas konata kun tiu ĉi neordinara homo. Krom la komuna E-agado en SEJM, niajn interesojn unuigas tradukado de poemoj kaj kantoj al Esperanto. Ni de tempo al tempo interŝanĝas niajn tradukaĵojn, pridiskutas ilin.

Semjon Vajnblat estas vaste konata ne nur kiel esperantisto. Li estas fama ruslingva kaj ukrainlingva poeto kaj ĵurnalisto: ekde 1986 li estis membro de la Unio de ĵurnalistoj de USSR, en 1991 iĝis membro de la Nacia unuiĝo de ĵurnalistoj de Ukrainio. En la jaroj 1963-1995 li laboris en la Respublika libroeldonejo "Majak". Semjon estas brila tradukisto. Krom la rusa kaj la ukraina lingvoj, li tradukas ankaŭ el la hebrea kaj la jida lingvoj kaj certe el kaj al Esperanto, kiun Semjon posedas ekde sia junaĝo. Li same kiel mi tre ŝatas tradukadi kantojn, ĉar li estas muzikema homo. Entute Semjon tradukis pli ol 100 diverslingvajn kantojn kaj romancojn! Ankaŭ estis publikigita granda aro da artikoloj kaj eseoj de S.Vajnblat en diversaj E-periodaĵoj de la mondo. Semjon bele kantas, li aŭtoras plurajn rus- kaj ukraun-lingvajn kantojn, plejparte pri Odeso, kiujn li ofte plenumas en diversaj koncertoj.

Unuvorte, li estas elstara homo, kaj mi fieras pro mia konateco kun li.

Sed mi deziras rakonti ankoraŭ pri unu epizodo de nia lasta renkontiĝo kun Semjon en Odeso en 2013, kiu havis poste neatenditan internacian daŭrigon. Dum mia lasta vizito al Odeso kune kun mia filino Maria Semjon rolis nian ĉiĉeronon tra la urbo. Li promenis kun ni laŭ la stratoj kaj placoj de Odeso kaj kun granda eruditeco kaj amo al la urbo rakontis al ni pri ties vidindaĵoj. Ni ankaŭ fotis unu la aliajn dum la promenado.

Mi rakontu pri unu el tiuj fotoj (vidu ĝin), kie mi kun Semjon staras ĉe la fama monumento al Zamenhof en Odeso. La foton faris mia filino, kiu post pluraj monatoj, kiam ŝi revenis al Novjorko, kie ŝi nun loĝas kaj studas en unu el kolegioj, petis min helpi al ŝi plenumi neordinaran taskon de la kolegia instruistino pri la angla lingvo. La tasko estis tia: necesus preni ajnan foton kaj, uzante nur vidaĵon, fiksitan

sur la foto, priskribi ĝin, maksimume eltirante informojn el la fotobildo per la dedukta metodo. Ni decidis priskribi ĝuste tiun ĉi foton. Rezulte aperis jena priskribo: "Sur la foto ni vidas monumenton: viran buston el hela materialo (probable gipso), fiksita sur la postamento el helkolora ŝtono, simila al marmoro. La busto montras viron kun inteligenta malmoderna aspekto, pri kio atestas specifaj okulvitroj, barbeto kaj lipharoj, jako, ĉemizo kun starforma kolumo kaj "papilia" kravato. Al la maldekstra bordero de la jako estas alfiksita kvinpinta verda stelo, kiu evidente havas simbolan signifon por la viro.
El la dulingva surskribo sur la postamento ni ekscias, ke la busto prezentas iun L.L.Zamengof, kreinto de la lingvo Esperanto, el kio ni konkludas, ke Esperanto estas artefarita lingvo. El la surskribo ni ankaŭ komprenas, ke la aŭtoro de la monumento estas skulptisto N.V.Blaĵkov, pro kies ruslingva kaj rusforma familinomo ni supozas, ke li apartenas al la rusa aŭ proksima slava nacieco (ukraino, beloruso). Pro la ruslingva surskribo ni konkludas, ke la monumento situas sur teritorio de Rusio aŭ sur tiu de la eksaj sovetiaj respublikoj (probable Ukrainio aŭ Belorusio).
Krom la ruslingva, ni ankaŭ vidas latinliteran surskribon, probable en Esperanto.
La monumento estas prizorgata: la placeto ĉirkaŭ la monumento estas pura, sur la piedestalo kuŝas freŝa florbukedo, el kio ni konkludas, ke en tiu ĉi loĝloko ekzistas adeptoj de Zamengof, kiuj zorgas pri la aspekto de la monumento.
Ĉe ambaŭ flankoj de la monumento staras viro kaj virino, evidente samaĝuloj (proksimume 60-jaraĝaj). Supozeble tiuj ĉi homoj estas bone konataj unu kun la alia kaj ambaŭ havas ian rilaton al Esperanto, ĉar ili decidis foti sin ĝuste ĉe la monumento al la kreinto de tiu ĉi lingvo.
Laŭ la aspekto de vestoj kaj ŝuoj de la homparo, ankaŭ pro la verdkolora foliaro de la arboj post la monumento ni konjektas, ke la foto estas farita en varma jarperiodo, probable somere".
Mia filino ricevis superan poenton por la eseeto. Poste ŝi decidis eksperimenti: ŝi dissendis la foton al siaj konatoj en Usono, Rusio kaj Ukrainio (ne esperantistoj) kun la sama tasko. Kaj momente ŝi ricevis respondon de unu el ili kun detala informo pri Esperanto, Zamenhof kaj N.Blaĵkov. Do, la dedukta metodo de la doktoro Watson en la epoko de Interreto rezultiĝis en ĉi okazo malefika. Nur la informon pri la nomoj de la viro kaj virino sur la foto Interreto ne donis. Aŭ eble oni malbone serĉis.

Ludmila Novikova

Niaj jubileoj

75-jariĝo de Gennadij Ŝilo

La 13-an de aprilo la kunveno en la klubo "Lev Tosltoj" estis dediĉita al la 75-jariĝo de Gennadij Ŝilo, kiu venis kun la edzino Liana Tuĥvatullina kaj la filino Sofia. Ĉeestis 11 esperantistoj plus speciala vizitinto – la rektoro de la Akademio, en kiu kunvenadas la klubo – Aleksandr Jakupov.
La kunveno komenciĝis fakte de la ruslingva gratulo de la rektoro. Li faris impo-

nan paroleton pri la personeco de la jubileulo kaj enmanigis al li grandan florbukedon.
Poste Gennadij Miĥajloviĉ rakontis pri siaj profesia kariero kaj E-agado, respondis kelkajn demandojn.
Sekvis gratuloj kaj donacoj de Valentin Melnikov, Klara Ilutoviĉ, mi, Nikolao Gudskov, Irina Gonĉarova, Aleksandr Milner. Svetlana Smetanina voĉlegis mesaĝon de Renato Corsetti kaj gratulan poemeton de Mikaelo Bronŝtejn kaj aldonis kelkajn donacetojn.
Fine de la gratulado Mikaelo Povorin gitarakompanis ĥoran kantadon de gratulkanto "Atlanto", verkita de Ludmila Novikova imite al la konata samnoma kanto (A.Gorodnickij, E-traduko de N.Cvileneva) kaj krome kantis "universalan" gratulkanton laŭ la teksto de Klara Ilutoviĉ.
Poste okazis nepra ero de similaj kunvenoj – la regalo.

Viktor Aroloviĉ

***

Kara Gennadij Ŝilo,
estas por mi granda privilegio povi bondeziri al vi okaze de via 75-jariĝo. Cetere, tute hazarde mi mem 75-jariĝis la 29-an de pasinta marto. Tio, kompreneble, estas io hazarda, sed ne tute, ĉar tio signifas, ke ni ambaŭ apartenas al generacio, kiu tenis la Esperanto-movadon vivanta kaj floranta en la dua duono de la pasinta jarcento. Kiam temas pri vi, en mia menso vi estas ligita kun Helmar Frank kaj AIS. Vi estas unu el tiuj granduloj, kiuj komprenis, ke Esperanto bezonas universitatan prestiĝon, kaj vi sukcesis akiri ĝin en Moskvo.
Nun estas la vico de homoj pli junaj ol ni daŭrigi la agadon, kvankam viaj konsiloj kaj helpoj estos certe ankoraŭ dum longa tempo bezonataj por la loka, landa kaj monda movadoj.
Mi aparte memoras kun plezuro nian renkontiĝon en Bulgarujo antaŭ jardeko kaj la plezurajn interbabiladojn en la plaĉa vetero de la printempa Karlovo.
Dankon pro viaj agadoj kaj bondezirojn al vi por pliaj feliĉaj jaroj nome de ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo, kiuj konis kaj ŝatas vin!

Renato Corsetti, amiko de Gennadij kaj eksa prezidanto de UEA

Al Gennadij Miĥajloviĉ, la nereedukebla justulo – por lia trikvaronjarcenta jubileo

Nemultaj restis, vere, de l' praepoko,
kie ekfloris nia Verda Ĝarden'.
Ja estas tempo, kiu staras sur loko,
kaj estas ni, kiuj moviĝas plu en
vortico brua de atingoj kaj perdoj,
el kiuj vere konsistiĝas la viv',
kaj estas ni, kiuj restadas plu verdaj,
kredante lingvon nian sen perspektiv'.

La zamenhofa dir' pri "homoj
kun homoj"
verŝajne taŭgas ne por ĉiu person'.
La vortoj veraj, kaj – por ni – aksiomaj,
ne ĉiun ulon rekonvinkis al bon'.

Sed vivas ni, kaj ni plu provas agiti,
eduki, voki, semi juston en mond'.
Se ni sukcesis eĉ nur kelkajn inviti, –
pli vasta iĝis dank' al ni nia rond'.

Ne estis glata nia viv', nek facila, –
facilas vivo nure por sapvezik', –
La amikaro tamen donis al ni la
deziron vivi kaj labori, amik'.
Do daŭru, daŭru l' viv-vortic' rotacia!
Eĉ se kun kelkaj problemetoj por san',
ni estas vere ja feliĉaj en nia
servado nur al justo – mano en man'!

Bruna Ŝtono

***

Gena,
sen multaj vortoj kaj troa pompo
Mi vin gratulas kore per simplaj vortoj.
Estu bonsana, bonstata kaj bonsukcesa,
Ĝuu amikan fidelon kaj aman kareson.
Viaj agadoj noblaj riĉigu l' karmon,
Vintre printempa suno donacu varmon.
Bonŝancis al mi vin koni, la homo ĉarma!

Irina Gonĉarova, 12.04.2016

***

Grava kaŭzo por nuna jubilo:
atendatas gratuloj – eĉ milo.
Ne kaŝebla en sako,
ne ŝanĝebla por sapo,
ĉiam akra kaj justa – jen Ŝilo!

Valentin Melnikov

Al 75-jariĝo de Gennadij Ŝilo

Li estas vera kosmonaŭto,
Stirilon tenas en la mano,
Eĉ se ja lian ŝipon-aŭton
Reale stiras nur Liana.

Sed spacon vere li posedas
Pli vastan ol la Sunsistemo –
Kaj lin la viv' neniam tedas,
Kaj de l' homar li estas kremo.

La spac' ja estas Esperanto –
La sola esti inda ILo,
Okup' pri ĝi ne estas vanto,
Ĝi igas Geĉjon esti brila.

De San-Marino ĝis Barato
Fariĝis li persono fama
Pli eĉ ol Putin kaj Obama,
La diamanto centkarata.

Prosperu Geĉjo, floru, brilu,
La Kosmon pli kaj pli konkeru,
La kantoj viaj laŭte trilu,
La artikoloj plu aperu.

Li mem ja kiel Esperanto
Kreita estas por eterno,
Li estas de l' movad' giganto –
Do, vivu plu sen tus' kaj terno!

Olda Koboldo, 12.04.2016

Omaĝe al Gennadij Ŝilo lige kun la 75-a jubileo
ATLANTO

Ne gravas via stato,
Ne gravas via aĝ',
Ĉar estas vi Atlanto
Ĉe l' mur' de Ermitaĝ'.
Ĉi tie dum jarcentoj
Atlantoj en senson'
Tenadis firmamenton
Sur manoj el la ŝton'.
Ni viajn grandajn penojn
Rigardas kun kompren' –
Ni scias, kiel ĝenas
La ŝultrojn tiu pen'.

Sed estas rol' misia
Plej grava sur la ter' –
Se malfortiĝos vi ja,
Falegos la ĉiel'!
Do, staru vi , JUST-ano,
Kun suno en la kor'.
Ne Dio, sed titano
Kutima al labor'!
Al nia Verda Stelo
Servante kun fervor',
Eltenos vi ĉielon
Per manoj kaj per kor'!

Ludmila Novikova, la 12-a de aprilo 2016

In memoriam

LISIJENKOVA (ŜARABKOVA) Valentina Danilovna (1944-2015), DENISOVA (SOPILJNJAK) Larisa Klavdijevna (1955-2015).

Samara Esperanto-movado orfiĝis. Antaŭ jaro forpasis du niaj samideaninoj, kiuj ege kontribuis al popularigo kaj evoluo de la lingvo en Samara gubernio. Observante iliajn biografiojn mi rimarkis, ke ambaŭ ili havas mirinde similajn detalojn. Ili kun gepatroj estis evakuitaj el Ukrainio (Dnepropetrovsko kaj Kievo), preskaŭ samtempe ekinteresiĝis kaj aktivis pri Esperanto, kvankam loĝis en diversaj urboj (Kujbiŝev/Samara kaj Novokujbiŝevsk), ambaŭ, fininte universitatojn, iĝis sciencistinoj (pri fiziko kaj komputado), dum la sama jaro ambaŭ naskis filinojn... Valentina gvidis E-kurson kaj fakon en la Ŝtata universitato, longtempe estis la vicprezidantino de la klubo, iniciatis

kaj organizis la unuajn familiajn renkontiĝojn, aktive respegulis la movadajn novaĵojn en la loka gazetaro. Larisa organizis E-kurson en Novokujbiŝevsk, al kiu aliĝis Vladimir Denisov, ŝia estonta edzo, E-poeto, tradukisto, kantisto kaj laŭreato de la konkurso "Liro". Duope ili kreis la unikan dulingvan kontraŭmilitan bildfilmon "Estos la pluvo karesa", kiun sukcese demonstris dum diversaj E-renkontiĝoj. Fine de OkSEJT en Ŝĉerbinka Larisa unuanime estis nomita "Miss Esperanto". La memoro pri Valentina kaj Larisa ĉiam restos en niaj koroj.

Igor Fejgin

KET

Krimeaj Esperanto-Tagoj

Nova informletero

Tempo: KET okazos inter **12**-a kaj **20**-a **julio 2016**, post **BET** en Litovio (2-10.07) kaj antaŭ **UK** en Slovakio (23-30.07).

Dezirantoj ripozi en Jalto pli longe povos ekloĝi en la komunloĝejo pli frue kaj resti post la tendaro.

Loko: Komunloĝejo de Jalta Komerc-Ekonomia Kolegio, kie en aŭgusto 2012 okazis 85-a SAT-Kongreso kaj en julio 2013 IJK-postkongreso en kadroj de "Velura Sezono-16"

Adreso: Стахановская ул. 13, общежитие, Массандра, Ялта

Loĝado: en blokoj kun necesejo kaj duŝejo: 2 ĉambroj 2-lokaj kaj 2 ĉambroj 3- aŭ 4-lokaj. Kosto de loĝado por unu persono estos ĉ. 300 rubloj tage (la plej malmultekosta en Jalto julie).

Manĝado: Ĉar somere studentoj ne lernas, speciale por la partoprenantoj funkcios studenta nemultekosta manĝejo

Programo: E-kursoj, Somera universitato, Arta programo, Rondaj tabloj, ekskursoj, kontribuoj de la partoprenontoj. En Somera universitato prelegos Jefim Zajdman, Paŭlo Moĵajev, Lóng Zhāng, Red Meltzer, Tatjana Loskutova, Vladimir Bespalov, Aleksej Nistratov

Pliajn informojn vidu ĉe:

<http://reu.ru/kalendaro/informletero/KET>

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov <nikolao@yandex.ru> aŭ (kaj) Svetlana Smetanina <svsmetanina@yandex.ru>.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 19.04.2016

KELKAJ IMPRESOJ PRI LA ROMANO "MI STELOJN JUNGIS AL REVADO"

***Mikaelo Bronŝtejn.* Mi stelojn jungis al revado**
Moskvo: Impeto, 2016. – 566 p., il. ISBN 978-5-7161-0286-6
Eblas mendi ĉe http://lernolibro.ru

1.

"Oni estas en du manieroj si mem, / jen ekstera jen suba flanko de kostumo. / (...). / Oni faras bildojn aŭ rekt-motivajn / aŭ – tiel nomitajn – la negativajn. / La unuaj la ombrojn kaj lumojn prezentas / inverse kaj ŝajnas al vido malbelaj. / (...) / Se iu animo dum vojo viva / fotografis sin laŭ maniero negativa, / oni do ne forĵetas pro tio la plakon, / sed simple ĝin sendas en mian fakon." (H.Ibsen "Peer Gynt")

Komence mi malkovros negravan sekreteton – laŭ la unua plano la kovrilpaĝo de romano devis esti tute alia, pli atentokapta, pli agreseca. Kun aro da duonnudaj samaspektaj viroj, marŝantaj sur la Ruĝa placo kaj ion kriantaj, pro kio vizaĝoj iliaj estas distorditaj. Por homo, kiu ne scias, ke tiuj viroj estas nur sportistoj dum parado (t.e. por ĉiu homo, kiu ankoraŭ ne vidis la paĝon 515 de la romano, kie la sama foto estas subskribita) tiu kovrilpaĝo nepre ŝajnus tro provoka, aroga. Do estis decidite uzi alian bildon. Inter kelkaj variantoj, afable faritaj kaj prezentitaj de J.Glinskaja, estis unuvoĉe elektita la nuna varianto. Sange ruĝa, kun bela vira vizaĝo, severe kaj regeme rigardanta la leganton. Kaj la voĉdonintoj, el kiuj multaj nek legis la romanon, nek sciis, ke la bela viro estas Ernest Drezen, trafis. Fikse rigardanta de kovrilpaĝo, dank' al miksaĵo de ruĝa kaj nigra koloroj, li similas fantomecan demonon, kaj same fantomece kaj demonece, ĉirkaŭita per la samaj koloroj, li aperadas en la romano – kvazaŭ ruĝa fadeno. Li siamaniere kunigas la partojn, ludas gravan kaj intiman rolon en la vivo de ĉiu el la

ĉefrolantoj, estas pasie amata de ambaŭ ĉefrolantinoj. Li aperadas en teksto ne ofte, plejparte en kelkpaĝaj "Intermezoj", sed intermezoj ja plene apartenas al li, ankaŭ tiuj du, kie li ne aperas – pri Postnikov, en kies destino li ludos la fatalan rolon, kaj pri Stalin, kiu en tiu teksto-peco estas jam lia baldaŭa ekzekutisto kaj kies eta sozio li estas.

Mi, verŝajne, ne eraros, se diros, ke Drezen estas la plej atentokapta, brila heroo, vere romantika, lermontoveca en sia demona, superhoma forto kaj malkohereco. Samtempe sugestanta estimon kaj kruelan malestimon, ravon kaj plenan malakceptadon, laŭ sia influo al la vivoj de ĉiuj aliaj herooj, laŭ sia influo al la leganto li povus esti nomata la ĉefa heroo de la libro.

Kaj Drezen estas prezentita ankaŭ kiel homa, vere homa, sugestanta profundan kompaton, timeman admiradon, vizaĝo de senhoma, senvizaĝa, ĉion forprenanta mortiganta forto, kiun oni kaŝas sub la vortoj "*Mi ne kulpas! La epoko kulpas! La epoko estas tia! Kruela!*" (p. 506). Li estas "*unu el tiuj Stalinetoj*", kiel diros antaŭ la fino lia interna voĉo. Verŝajne mi ne eraros, prognozante, ke aperos multnombraj legantoj, kiuj plendos: "tiu forto estas prezentita nur de malbona flanko, kaj ja ekzistas alia, tiaj severaj agoj verŝajne estis bezonataj, do vi, aŭtoro, devis prezenti ankaŭ la alian flankon, kaj ankaŭ al ĝi doni la vizaĝon, homan vizaĝon, propran veron!" Certe tiaj legantoj aperos, la aŭtoro mem en la postparolo prezentas ies opinion pri Stalin, kiel "*efika manaĝero*", antaŭdirante tion. "Ĉiam – diros tiuj legantoj – diversaj aŭtoroj sukcesis trovi helan flankon de murdistoj, inkviziciistoj, maniuloj k.t.p. Jes, vi montris kelkajn heroojn de *alia flanko*, ekzemple Abramov, sed tio ja ne estas homo, sed monstraĉo, tiaj en realo ne ekzistas!" Ili, certe, pravas. Sed kiam mi ekpensis pri tio, en mian memoron tuj venis duonforgesita nomo "La dioj soifas", nomo de romano, kie A.France priskribis la francan revolucion – kiel ebrian feston de libero; kaj poste – kelkajn jarojn post ĝi, kiam ĉiuj herooj dronis en propra sango, kaj dronigis en ĝi la tutan landon. Kaj ankaŭ tie unue personigita, mortiganta forto perdas homan vizaĝon, iĝas iu superhoma morna ondo – de tie venis la nomo de tute senreligia romano – "La dioj soifas", kiu kvazaŭ senkulpigas la homojn, liberigas de peko tro granda por iuj ajn homoj. Kaj la saman motivon de superhoma mortiganta forto, kiu onde mortigas ĉiujn kaj ĉion ankaŭ post bunta festo de revolucia liberigo ni povas vidi en rakonto de Leonid Andrejev "Tiel estis". Simbola rakonto, ĝi ne estas ligita al iu historia revolucio kaj enhavas trajtojn de estintaj kaj la estonta, jam antaŭsentata Rusia. Tie sensente mortiganta forto estas tute liberigita de homeco – estas monstro, kiu loĝas en frida rivera profundo. Do, ni povas vidi, ke ekzistas tia forto, kiun aŭtoroj tute diversaj ne volas

aŭ ne povas ligi al homo, ĉar tute nekredebla, netolerebla estas ĝia reala homa origino.

Tamen en nia romano ekzistas heroo-ponto inter la homa kaj la senhoma. Kaj ne nur pro bela demoneca forto, sed ankaŭ danke al tiu liganta rolo inter la herooj-homoj kaj la terura epoko, ĝuste li, Drezen, povas esti nomita ĉefrolanto de romano.

Tre kuraĝa, por ne diri tro kuraĝa, estas la formo de la lasta intermezo. La nomo mem parolas pri la enhavo: "*Drezen kaj Drezen*". Jes, estas klasika, preskaŭ kiĉa formo de la lasta juĝo super la heroo – kiam duonfreneziĝinta li parolas kun si mem, sed verdire parolas kun dio/diablo, kun realiĝinta tutmonda vero, kies rolon nepre prenas al si la aŭtoro, kune kun rajto ĵeti heroon en inferon aŭ paradizon, pardoni aŭ por ĉiam lasi nepardonita.

2.

"Ĉio evidentas, proksimas, kvazaŭ estas jam delonge trovita (...) mankas loko por revoj, kaj la ĉielo ne videblas. Kaj ĉu indas rigardi en tian ĉielon, grizan kiel viraĉa felpalto, sen rozoj ĉielaj (...) Ĉi tie de limo ĝis limo kreskas nur duonmortinta arbustaro. Oni malaperos en ĝi, sed vi amas ĝin per ĝismorta amo; oni eliros en arbustojn, ekstaros sur marĉo. Kaj ja nenio plu estas bezonata. Oro, oro ie en fundo kantas." (A.Blok)

Kiam mi atente kaj senhaste rememoris la tutan romanon kelktage post legado, min pikis sengaja penseto. La steloj el la romantitolo nenie sur ĝiaj paĝoj estis "jungitaj", se ni diru poetece. Neniu el la herooj sentis profundan inspiron aŭ helan feliĉon sufiĉe forte por kovri la leganton per ĝi kaj igi lin senzorge revi, tremetante kredi ke de nun kaj por ĉiam ĉio estos bona – en la vivo de la heroo, certe, kaj iomete en lia propra. Momentoj de pura flugo en la romano mankas, neniu el la herooj eĉ ne por unu momento estis plene liberigita de sub la aŭtoro kun ties scio kaj sperto. Tiu senzorga flugo mankas ankaŭ dum la plej stelplenaj momentoj: stela kupolo super la amplena nokto de Ŝlomo kaj Vera pleniĝas per tremanta antaŭsento – tiu nokto estas mallonga, tiu nokto estas ilia lasta. Hispanaj varmaj kaj brilaj steloj super Talis kaj Francine miksiĝas kun kugloj kaj krioj. Tamen la stela temo tenere, arĝente trapenetras la tutan romanon, steloj prilumas multajn gravajn momentojn, kaj iliaj etaj verdaj ĝemeloj ornamas vestaĵojn de kelkaj herooj por ke la leganto povu facile rekoni ilin. Steloj brilas super la novjara nokto de la komenciĝinta jaro 1936, kaj ebriaj gajaj herooj, inspiritaj per ilia brilado, revas pri malproksimaj planedoj kaj pri sia propra eblo iam baldaŭ ilin viziti. Tute proksima, tute reala revo en la rapidege vastiĝanta mondo, revo de homoj por kies plejparto tiu Novjarfesto iĝos la

antaŭlasta. Kaj ankoraŭ unu arĝenta guteto – la epigrafo de la lasta ĉapitro pri la asteroido "Zamenhof" – jes, ĝi ne estas stelo, sed tamen io el tiu, stela mondo. Io eta, forfluganta, tuj malaperonta. Bonega epigrafo por fino de la libro, por kelkaj paĝoj, al kiuj restis nur palaj, estingiĝantaj rememoroj. Kaj inter ili – foto de SAT-kongreso en Leningrado, kun ĉiuj ĉefaj herooj, ridetantaj, tenantaj manojn unu de la alia. Kaj super ili – ora anĝelo de Petropavlovskaja fortikaĵo. Nur nun, pli bone poste ol neniam mi kaj, ŝajnas al mi, plejparto de la legantoj komprenas, ke ĝuste tiu momento el mezo de libro, la leningrada kongreso, priskribita hele, sed modeste, estis la koro de la tuta rakonto, estas la plej alta punkto, tago de "*Somera solstico, de plena triumfo post kiu la vojo gvidas reen, en obskuron*" *(T.Mann)*. Kaj certe, ĝuste en tiu momento plej proksimis steloj, estis preskaŭ jungitaj. Per la okuloj de Ŝlomo estis montrita unu el ili, vespera, granda, pendanta super la kongresejo, tiom brila, ke radioj ĝiaj ŝajnis verdaj. Kaj poste ĝi paliĝadis, malaperadis, kaj finifine, malgrandiĝinta je asteroido, ĝi forflugas – ĉu ien, ĉu ne por ĉiam?

Kortuŝa fino, tuj reviviginta mian unuan demandon, kiu de la legadkomenco turmentas min. Kial, diablo prenu, kial tia komenco?! Kial dum la nelonga unua parto al la kvinopo de ĉefaj herooj okazas samtempe kaj senpaŭze ĉio, kion devus ŝategi averaĝa legant...spektanto de popularaj aventuraj krimaj filmoserioj? Mortigado, perfortado, blasfemado, banditoj en virinaj felpaltoj, malpuraj ebriaj maristoj, amorado en duonlumigita hotelĉambro... mankas nur heroo, per nudaj manoj mortiganta rabian elefant...urson – ĉio alia el tia serio ĉeestas. Kial? Ĉu por atingi atenton de la averaĝa neekzistanta leganto? Sed tio nur trompos lin, ĉar la cetero de romano ja estos tute alia, pensema, profunda, homeca. Mi konas homon, kiu ĉesigis la legadon post tia komenco kaj perdis la reston, ĝuste tion, kion li volis tralegi, malfermante la romanon.

Post tia komenco mi timis la finon. Timis superfluan, troan priskribadon de torturoj kaj ekzekutoj, de malfeliĉo kaj senespero. Sed mia timo ne realiĝis. Nenio tia estas en romano – krom parte montrataj torturoj nur de du la plej animfortaj herooj, la aliaj restas ekstere, por ke ĉiu imagu mem. Tion mi estimas, forte estimas ĉar bone scias ke tiel nomataj "malpermesitaj temoj" – plenkoloraj detalaj priskriboj de suferego, doloro, plena perdo de homaj aspekto kaj menso – bedaŭrinde ĉiam plaĉas al kritikistoj, malgraŭ ke ilia influo al la leganto ĉiam estas negativa, malfortiga.

La romano konsistas el sep partoj, ĉiu enhavas apartajn ĉapitrojn pri ĉiu el la kvin ĉefaj rolantoj, elpensitaj herooj, kies historioj kaj destinoj kunteksiĝas en unu historion, akceptante en ĝin aliajn heroojn, historiajn kaj elpensitajn. Estis interese por mi, ke la ĉefaj herooj estas prezentitaj ne

egale – ĉu laŭ intenco, ĉu sub influo de propra rilato al ĉiu el ili, aŭtoro montras ilin de diversaj vidpunktoj. Kiam Ŝlomo pensas – ni vidas liajn pensojn, humoron, revojn, timojn, ni konas lian animon. Kiam pensas Talis – ni vidas, ke li rigardas fenestron, sidas apud tablo, trinkas konjakon, kaj lian animon ni povas nur diveni. Pri la aspekto de Ŝlomo ni konas nur kelkajn trajtojn – pri kiuj li mem, pensante, rakontis al ni, kaj ankaŭ tiuj trajtoj estas pli naciaj ol liaj. Sed Talis ni preskaŭ vidas – kun lia svelteco kaj alteco, aminda rideto, ofte ruĝiĝantaj vangoj, kun ĉiuj specoj de liaj vestaĵoj, kaj civilaj, kaj militaj, kun lia ĉiama kutimo amikeme meti manojn sur ŝultrojn de iu ajn, eĉ de malsimpatia fremda avinaĉo en plurfamilia loĝejo. Do Ŝlomon ni plejofte vidas per la okuloj de Ŝlomo mem, Talis – per tiuj de admiranta spektanto, Vasilij – per tiuj de spektanto moketebonkora. Samo okazas pri la aliaj. Kiam Vera serioze enamiĝas, ni vidas per ies okuloj ŝian viglecon, vivplenon, subitajn ridetojn kaj eksterordinaran laboremon. Kiam serioze enamiĝas Francine, ni el ŝiaj propraj pensoj scias, ke ŝi volas infanojn kaj belan dometon, kaj ĉiam vivi kun sia viro. Tiun neegalecon en prezentado de la herooj mi ŝatas, ĝi kreas fidon al la aŭtoro – kvazaŭ li rakontas tion, kion vere scias, kaj pri aliaj, duonkovritaj de li mem flankoj – silentas.

Devas mi ankaŭ iomete diri pri la mondo de la romano. Mi estas ruso, por mi tute sufiĉas vortoj Kremlo, Sivcev Vraĵek, Tverskaja por ke antaŭ miaj okuloj bunte kaj klare aperu Moskvo kun sia ĉiam oreca lumo, ĉiama bruo kaj la sonoranta gaja antikveco. Por mi sufiĉas vortoj Neva kaj Petropavlovskaja fortikaĵo por vidi la fride-brilan ĉielon de Petrogrado-Leningrado kun ties mornaj kaj neforgeseble belegaj stratetoj. Sed ŝajnas al mi, ke por homo, kiu ne vizitis Moskvon, Peterburgon, precipe al homo ne vizitinta Rusion ĝenerale, ne sufiĉos raraj priskriboj. La aspekto de tiutempa Rusio kaj de aliaj lokoj kaj landoj restos por li pala, same kiel por mi ne aperis, kiel rememorindaj dekoracioj, Francio, Hispanio, Vojo Nova. Sed oni diras, ke bona literatura mondo estas kreita ne nur el tio, kio videblas, sed ankaŭ el tio, kio aŭdeblas, tuŝeblas, gustumeblas. Do, aparta kaj ege etosfaranta agrablaĵo de libro – estas manĝado, kiu ne nur ĉeestas por "alterigi" la heroojn, sed ĉarme substrekas humoron, tempon, lokon. Varma porkaĵo kun terpomo kaj pruna brando ĉe Vasilj, montranta lian familiecon, proksimecon al la tero, al la natura vivo – proksimeco, kiu fine savos lian vivon. Freŝaj fruktoj dum malsata vintro, por Vera – io nekutime bela kaj alloga, substrekanta ŝian nekutiman belecon kaj allogon. Kraba salato kun malvarma bovina lango en Moskvo – tiom moskveca. Kaj benjetoj kun sukera pudro apud Vasiljevskij – tiom peterburgecaj. Tio ludas gravan rolon en kolorigado de la priskribita mondo.

3.

“Multe ili, kompatindaj, parolis pri indulgemo dia – mi ne scias ja ĉu sufiĉos ĝi por ili. Sed homa kompreno – tion mi perfekte scias – ĉiam, por ĉiuj sufiĉos!” (T.Mann “Doktoro Faustus”)

Certe la unua kaj gravega valoro de romano estas ĝia historieco, Esperanto-historieco. Ne priskribo de “Kruela epoko”, de granda tragedio, sed elkaptitaj el ĝi apartaj specifaj homaj destinoj, pecetoj de destinoj, mallaŭtaj voĉoj, zorgeme ĝisportitaj de la aŭtoro forme de rakontoj, dokumentoj, fotoj.

Mi povus supozi, ke valoreco de historia romano estas ne nur en ĝia rolo rakonti, klarigi kaj iomete analizi tion, kio estis. De frua infaneco oni sugestas al ni – historio gravas, ne eblas vivi sen kompreno de historio. Vane oni tion faras. Historio por homo ja estas aro de ombroj, kiuj staras malantaŭ la dorso, staras por siatempe malpermesi al li fari paŝon reen, fuŝan paŝon for de elektita vojo. Sed por senti tiujn ombrojn, starantajn antaŭ li, la homo mem devas stari. Kaj por elekti ombrojn, kies ĉeesto helpos ne misvojiĝi, la homo devas havi vojon. Do sincera bezono je historio estas ne pro infaneca devo, sed rezulto de iu pli malpli matura elekto. Jen pro tio specife gravas Esperanta historieco de la romano, feliĉaj horoj kaj torturoj, misfaroj kaj heroaĵoj de samideanoj, de homoj kun kiuj ni ja estas tenere ligitaj, ĉar de tiaj helaj kaj mornaj tempoj, tra militoj kaj sociaj ŝanĝoj ĝis nun kaj ĉiam ili faras la komunan aferon.

Realaj priskribindaj personoj multas. Kiom ajn granda estus la romano, la aŭtoro ne povus doni al ĉiu el dekoj da herooj la ĉefan rolon, la taŭgan kvanton de paĝoj. Do aperas malfacilega problemo – pentri sangoplenan memorindan imagon per du-tri strekoj. Nikolao Nekrasov – poeto, kies mistrafon en la traduko de “Eŭgeno Onegin” montras unu el la ĉefrolantinoj – solan mistrafeton kiu montras samtempe meĥanikecon de lia traduko kaj senkapablon kompreni verajn tenerajn, kaŝitajn sub ĉiutagaj vortoj sentojn de alia homo; la sama Nekrasov estas la unua homo en la teksto, kies besta timo estas montrata al la leganto. Pretas imago. Alia ekzemplo – la malfermita, romantika Sneĵko, kiu korespondas kun Ciolkovskij, revas pri kosmo kaj dum Novjara nokto al sia ebrieta kompanio rakontadas sciencajn informojn pri steloj, miksante ilin kun legendoj pri nomoj de konstelacioj. Kaj fine kun fermitaj okuloj pasie elpensas gastamajn grandokulajn venusanojn. Farita, estas imago. Multaj kaj multaj destinoj estas reviviĝantaj sur la paĝoj.

Sed ĉiam historieco metas sur la ŝultrojn de la aŭtoro pezan respondecon. Ne nur pri rakontado de Vero – Vero ja estas aĵo efemera, sed

ankaŭ respondecon antaŭ siaj herooj. Aŭtoro de fikciaĵo rajtas per ajna maniero torturi aŭ feliĉigi, kondamni aŭ liberigi sian elpensitan heroon, sed kiam temas pri heroo ne elpensita, pri vere vivinta homo, kies sorto jam estas plenverkita, neŝanĝebla, tie la aŭtoro havas duoblan kaj pli profundan respondecon. Pli profundan, ĉar nun temas ne pri vivo, sed pri senmorteco, eterneco de tiu tute reala homo. Kaj duoblan, ĉar tiu senmorteco havas du diversajn flankojn. La unua – arta, literatura senmorteco, kie temas pri heroo, ne vera homo, tia, kie la aŭtoro prenas al si dian rajton pardoni aŭ kondamni la animon, sendi ĝin al infero, aŭ savi. La dua kaj certe pli grava flanko de la respondeco estas la homa memoro, ne religia aŭ literatura, sed tute reala senmorteco. En la memoro de la leganto homo restos ĝuste tia, kia li estis pentrita de la aŭtoro. Kaj ju pli multe da legantoj havas iu aparta libro, ju pli rare tiu reala persono aperas en aliaj libroj – ĉu historiaj aŭ fikciaj – des pli fortan influon al homa memoro havas la imago kreita per unu libro. Kelkakaŭze ĝi povas plene formi tiun homan memoron – unusolan sendiskute ekzistantan senmortecon.

Kaj nun mi volus reveni al "Drezen kaj Drezen". Pri la dua flanko de respondeco mi tute trankvilas, la monumento estis kreita, kaj sendube ĝi estas neforgesebla, kaj sendube ĝi estas, jes terura kaj trista, sed tamen estiminda. Pri la unua flanko... (kiel romantikulo mi povas konfesi, ke ĝi gravas por mi, mi ĝin atendis) pri milde-homeca sentimenta parto pri pardono aŭ kondamno... La aŭtoran elekton mi, bedaŭrinde, ne komprenis, ne kaptis.

Anna Striganova (Moskvo)

NOVA DISKO DE "KAJTO"

"Kajto flugas" estas ne malpli ol la sepa KD de la duopo "Kajto" Ilia debuto datiĝas jam de 1989, sed la duopo restas ankoraŭ same energia kaj inventema kiel ĉiam. "Kajto Flugas" estis prezentita por la unua fojo dum UK en Lille en julio 2015, kun 14 novaj kantoj el 15. Amaso da instrumentoj, inkluzive de akordiono, banĝo, buŝharmoniko, citaro, gitaro, koncertino, kontrabaso, mandolino, sintezilo kaj ŝalmo, kristaligas la estintecon kaj estantecon, firme certigante la sentempecon de la mesaĝo de la universala lingvo.

Kompleta katalogo de Vinilkosmo troveblas ĉe <http://www.vinilkosmo.com>. Tie eblas aŭskulti muzikfragmentojn kaj mendi la diskojn.

Informletero de Vinilkosmo

DEK DU IMPRESETOJ PRI KOREIO

En januaro 2015 por naŭ tagoj mi flugis al tiu belega kaj tre malproksima rando de la kontinento. Ve – nur por naŭ tagoj! Kaj nur kun unu plena tago en la ĉefurbo de tiu ĉarma, gastama lando... Sekvajare Esperanto prezentos al mi novan eblon viziti Koreion, ĉar tieaj esperantistoj akceptos la Universalan Kongreson. Do fakte ne nur al mi, sed al ĉiu deziranta esperantisto, kondiĉe tamen, ke tiu posedas konsiderinde grandan sumon por la vojaĝo. Sed la lando valoras tion! Por iom kredigi kaj entuziasmigi vin pri tio mi prezentu impresetojn de mia pasintjara vojaĝo.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

* * *

Longa-longa-longa l' povdistanco!
Granda-granda-granda la avio!
Rava-rava-rava la bonŝanco
dum dek horoj flugi super ĉio:
super arbaregoj la plej densaj,
super la riveroj plej potencaj,
super metropoloj en nebulo
de Sankt-Peterburgo ĝis Seulo!

Ĉarmaj-ĉarmaj-ĉarmaj stevardinoj
paŝas-paŝas-paŝas elegante,
kvazaŭ-kvazaŭ-kvazaŭ la diinoj
min dorlotas ame kun elan' de
senriproĉa, sorĉa, simfonia
etalon' de l' ĝentilec' avia,
tute ne malgrava en aero
dek mil metrojn super mia Tero.

Mola-mola-mola plejdo lana
dolĉajn-dolĉajn-dolĉajn sonĝojn
vartas.
Mi-mi-mi kontentas plej, do vana
estus plend', se tiom mi bonfartas.
Sed penset' pikanta penas peke
sonĝojn miajn enfiltriĝi veke:
ĉu ne venos ŝanĝoj de la farto
en la nekonata mondo-parto ?

* * *

Freŝas vento en Iksan,
sed ne fortas,
ekon de l' penetra son'
ĝi alportas.

Fortan baton sekvas bat',
la sonoro
fluas laŭ montara pad'
al la foro.

La sonoro de Samdong –
por momento
ĉiu haltas ĉe la son'
en silento.

Korojn ligas la sonor'
super ĉio.
Silentigas la sonor' –
tradicio.

Mi, laika hazardul',
ekmeditas,
tra la densa pens-nebul'
vojon vidas.

Ja ne rektas vojlini',
serpentumas,
sed la sono super mi

kvazaŭ lumas.

Faciliĝas mia spir'
postmedite,
rapidiĝas mia ir',
kaj subite
haste mi la vagabond'
sonojn ligas –
la sonoro de Samdong
min kantigas.

* * *

Mi jam scipovas bastonetojn manipuli,
sed la amikon mi rigardas kaŝe: ĉu li
ridetas nun pri mia manĝa senlerteco,
se en teleron reen falas tiu peco,
kiun mi lerte levis preskaŭ ĝis la buŝo.
La barbo kaŝas mian honton pro la fuŝo,
kaj ne ridetas la amiko tre ĝentila,
l' dikfingron levas li aprobe, kiam mi la
peceton saman tute lerte enbuŝigas.
Mi ĝojas: eĉ manĝado nun nin ligas.

* * *

Ĉu ĝi estas vera kimĉio?
Spicita – ho, ve ! – pli ol ĉio!
Mi sentas enbuŝe falĉilon,
se maĉas mi pecon kimĉian!
L' amikoj-koreoj ja ĉiuj
kontentas pri lezoj kimĉiaj,
sed mia palato racie
rezignas suferi kimĉie.

* * *

La milda percepto de Koreio
nestiĝas en mi tra la prismo
de l' kora pacamo de la eklezio –
de ŭonbulismo.

Nenien baptita, neniam preĝinta,
mi tamen ŝategus kompreni
eĉ malgraŭ nekredo enradikiĝinta,
kio okazus, se ni
forigu venenojn, certigu bonfarojn,
kaj Budhon eksekvu senlace, –
ĉu vidos ni la horizontojn pli
klarajn
por ĉion akcepti pace?

Vivanta en mezo de l' monda
frenezo,
en la sangavida socio,
mi dubas. Kaj dub' mia estas
herezo,
malkoincido.
Sed mi, la profano, nun kaptas
en ĉio,
kun peno kaj ŝvit' tradukante,

la ĉarman animon de Koreio,
kiu resonas enkante.

* * *

Pardonu, ĉarmulino...
Mi riskis meti manon
sur vian logan ŝultron –
por fotoj – nur amikaj!
Kapneis kun obstino,
mokante min profanan,
vi. Nekomprenon stultan
naive montris mi, kaj

aŭskultis la sopranon
plensentan, puran, pacan,
sincere infanecan,
kaj kun ioma timo :
– Forprenu vian manon,
la manon tro aŭdacan.
Ja, havas mi la edzon,
vagantan en proksimo...

Mi skrapis mian nukon
en stuporiĝo mira,
nenian taŭgan vorton
trovante por respondo,
kvazaŭ mi staris nun kun
anĝelo ĉielira
kaj ties helan sorton
kotigis, vagabondo.

Kun pento, lipomordo,
kvazaŭ de sur gladilo
varmega, mi forprenas
la manon – jen destino!
Fosinte en memor' do
mi diras kun trankvilo:
– Do... ankaŭ min atendas
enhejme la edzino...

* * *

Busan. Grandega havenurbo.
La sun' brilegas januara.
Tordetas en tumult' bazara
animon mian la perturbo.

Laŭ la senfinaj vendostratoj
paŝante kun impet' scivola
en la amaso onda, bola,
mi ja plenplenas je kompatoj –
al la sardinoj, umbroj, skombroj,
haringoj, salmoj kaj sardeloj,
loligoj, algoj, konkoj nombraj
kun nekonataj nomoj belaj.

Ja nek fiŝisto, nek vendisto
suferas pro l' rimors' – eĉ febla!
Estas profita, ĉar manĝebla
ĉiu estaĵo en la listo.
Do, senigita je kuraĝo,
kun tristo, pento kaj amaro
mi spiras, kvazaŭ marestaĵo, –
anhele en la fiŝbazaro.

Kirliĝas ambiguaj sentoj
en mia kor', en la stomako...
La kor' aklamas al atako,
por la liber' de l' maraj gentoj!
Sed la stomak' por pli racia
pripenso paca min admonas,
kaj kontraŭ kompatemo mia
ĝi fortajn argumentojn donas.

Ĉu vere estas ĝi barbara,
l' aspiro frandi delikatajn,
perfektagustajn, adoratajn
karnaĵojn el profundo mara?
Mi l' kapon turnas dekstren, liven
al tiu bunta karno-svarmo,

avide glutas la salivon
kaj cedas – kun kompata larmo.

La koro ĉiujn plu kompatas,
sed la stomako jam malsatas!

* * *

Granda ruĝa poŝtkesto
ĉe la bord' Pacifika
ĉu por mia konfes'? Do
agu l' poŝto helika.
Diru mia letero
nur al vi en Eŭropo,
ke dorlotas vetero,
ke ne tristas mi tro, po
tri supetoj bolegaj
ĉiutage frandante,
ke, post miaj prelegoj,
aplaŭdante, laŭdante,
kortuŝitaj koreoj
en etoso unika
min inspiras al kreoj
por la rondo amika,

ke belegas la lando,
admirindas naturo,
ke al ĉiu demando
pri l' nacia kulturo
la koreoj respondas
kun afabla fiero,
ke la akvo plu ondas
kaj plu firmas la tero,
ke tuŝante l' ondaron,
ŝaŭmon de l' oceano,
kvazaŭ vin, mian karan,
mi tuŝetas per mano,
ke ĉi-ĉion, fluganta
per arĝenta avi',
certe diros mi antaŭ
la letero al vi.

* * *

Ĉu ĝi estas tipa
amuzaĵ' korea –
kanto-ekzercado
la karaokea?
En mallumo venas
ni en la salonon.
Sen kuraĝo prenas
mi la mikrofonon.

El laŭtparoliloj
melodi' eksonas.
Mi karaokeas,
mi la voĉon spronas,
mi en mikrofonan
kapon de serpento
provas meti iom
da sincera sento.

Ho, la voĉo laŭtas,
sed malemocias!
Kaŭzon de la kazo
mi ne tuj konscias.
Eble, pro muzika
akompano peza
ankaŭ voĉo mia
iĝas jam sinteza...

Uf... jen fin' de l' kanto,
la muziko haltas,
kaj poentoj miaj,
certe, ne tro altas.
Tamen – travivaĵo...
Per la voĉo trema
mi singulte dankas
al amiko Nema.

* * *

Ho jes, hodiaŭ mi prelegas en Seulo
por la esperantista rondo simpatia.
Raŭkete sonas parolado arda mia –
jen malkomforta nervoziĝo senebria –
kvazaŭ hazarde mian gorĝon trafus kulo.
Ho jes, hodiaŭ mi prelegas en Seulo
por aŭskultantoj miaj, preskaŭ nekonataj.
Kaj ekvilibron trovas miaj kruroj vataj
kun peno. Kaj paroloj miaj ne tro glataj
kun peno lasas fridan langon de l' timulo.
Ho jes, hodiaŭ mi prelegas en Seulo,
trankvilon prenas en vizaĝoj atentemaj,
en vigla fluo de l' demandoj diverstemaj,
kaj la parolo venas pace, sen ektremoj,
kaj la aplaŭdoj ardas – estas la stimulo
por la kantad' elana, por anima brulo –
Ho jes, hodiaŭ mi prelegas en Seulo !

* * *

Surmonte nebuleto ripozas,
La suno, protektanta ĝin, krozas
en bluo de l' ĉiela angulo,
en alto super vintra Seulo.

Promene paŝas mi kun amiko
inter ĝardenoj, stratoj kaj placoj,
inter moderno kaj ekzotiko
al aro de la reĝaj palacoj.

Laŭ mi la sencon iom kontraŭas,
ke ilin nun domegoj ĉirkaŭas.
Inokulita en la moderno
de la epok' pasinta la kerno
aspektas kiel rara juvelo
per kadro senigita je belo.

Sed tamen – pitoreska peceto
de la reĝland' vivinta en gloro,

de l’ inta reĝa viv’ multfaceto,
pri l’ pompa reg’ edifa memoro.

Mi gapas al specifaj tegmentoj,
al reĝaj aĵoj, apartamentoj,
al buntaj vestoj de l’ sentineloj...
Mi gapas. Unu el miaj celoj –
ne la plej grava – estas promeno
en tiu ĉi turista edeno.

Kaj bedaŭretas mi seninsulte,
ke mi Seulon spektis ne multe.
Do, se fortun’ bonvolos min beni
mi senhezite strebos reveni.

Al Taesok

Amiko mia,
akompananto,
mirindas ĉio
en Koreio
por mi, en vanto
partoprenanto
de l’ historio.

Amiko mia,
en januaro
ĉeesto via
dum koreia
vojaĝ’ de l’ maro
al plia maro –
bonŝanco mia.

Do vian mankon
dum tagoj belaj
ne imagante,
mi, plu revante,
nun al vi diru
Poeme, kante
Sinceran dankon!

Januaro 2015

Tradukoj de Ludmila Novikova

Anna Aĥmatova *(omaĝe al 50-jariĝo de la morto)*

Все души милых на высоких звёздах…

Все души милых на высоких звездах.
Как хорошо, что некого терять
И можно плакать. Царскосельский воздух
Был создан, чтобы песни повторять.

У берега серебряная ива
Касается сентябрьских ярких вод.
Из прошлого восставши, молчаливо
Ко мне навстречу тень моя идет.

Здесь столько лир повешено на ветки...
Но и моей как будто место есть...
А этот дождик, солнечный и редкий,
Мне утешенье и благая весть.

1921

Sur steloj la animoj karaj…

Sur steloj la animoj karaj foras.
Kaj bonas, ke ne eblas plua perd'.
En Carskoje Selo la koro ploras
En la aer', kreita por poet'.

Ĉe bordo la saliko bluarĝenta
Septembram akvon tanĝas per foli'.
Resurektinta el pasint', silenta
Fantomo mia pasas jen al mi.

Dispendas liroj sur branĉar' fekunda...
Sed por la mia ankaŭ estas spac'...
Kaj la pluvet', sunplena, malabunda,
Por mi nun estas la konsol' kaj grac'.

1921; tr. 1990, 2016

Молитва

Дай мне горькие годы недуга,
Задыханья, бессонницу, жар,
Отыми и ребёнка, и друга,
И таинственный песенный дар.
Так молюсь за твоей литургией,
После стольких томительных дней,
Чтобы туча над тёмной Россией
Стала облаком в славе лучей.

1915

Preĝo

Min malbenu per longa malsano,
Per anheloj en febra korp-stat',
Per forpren' de amiko, infano,
Kaj mistera kapablo por kant'.
Tiel preĝas mi dum liturgio
Pro senĉesaj suferoj de l' kor',
Por ke l' nub' super mia Rusio
Transformiĝu je nimbo de glor'.

1915; tr. 2014

А, ты думал…

А ты думал – я тоже такая,
Что можно забыть меня,
И что брошусь, моля и рыдая,
Под копыта гнедого коня.

Или стану просить у знахарок
В наговорной воде корешок
И пришлю тебе странный подарок –
Мой заветный душистый платок.

Будь же проклят. Ни стоном, ни взглядом
Окаянной души не коснусь,
Но клянусь тебе ангельским садом,
Чудотворной иконой клянусь,
И ночей наших пламенным чадом –
Я к тебе никогда не вернусь.

1921

Ĉu vi pensis…

Ĉu vi pensis – mi estas tre simpla,
Ke vi povas forgesi min,
Ke mi falos kun petploro sibla
Ĉe la hufoj de l’ brunĉevalin’.

Ke mi petos por via envulto
Herbradikojn ĉe la sorĉistin’
Kaj donacos al vi pro la kulto
Mian tukon el fajna muslin’.

Por vi restas nur mia malbeno!
Mi ne tuŝos vin per mia kri’.
Ĵuras mi per anĝela ĝardeno,
Per mirakla ikon’ ĵuras mi
Kaj per flam’ de l’ amnokta geheno –
Mi neniam revenos al vi.

1921; tr. 2016

Не с теми я, кто бросил землю…

Не с теми я, кто бросил землю
На растерзание врагам.
Их грубой лести я не внемлю,
Им песен я своих не дам.

Но вечно жалок мне изгнанник,
Как заключённый, как больной.
Темна твоя дорога, странник,
Полынью пахнет хлеб чужой.

А здесь, в глухом чаду пожара
Остаток юности губя,
Мы ни единого удара
Не отклонили от себя

И знаем, что в оценке поздней
Оправдан будет каждый час…
Но в мире нет людей бесслёзней,
Надменнее и проще нас.

1922

Estas ne mi, kiu forlasas…

Estas ne mi, kiu forlasas
Patrujon en danĝera stat’.
Kaj vane forfuĝintoj flatas –
Ja ne por ili sonu l’ kant’.

Sed rifuĝulojn mi kompatas,
Kiel viktimojn de malsan’,
Ĉar ties vivovoj’ malglatas,
Absintodoras fremda pan’.

Sed ni en fum’ de l’ incendio
Sen resto de juniluzi’
La batojn kontraŭ la patrio
Alprenas kiel kontraŭ ni.

Jes, en pritaksoj postmultjaraj
Foriĝos nuna kalumni’...
Ne estas homoj pli korklaraj,
Fieraj, firmaj ol nun ni.

1922; tr. 2014

Смерть

А я уже стою на подступах
к чему-то,
Что достаётся всем, но разною
ценой…
На этом корабле есть для меня
каюта,
И ветер в парусах – и страшная
минута
Прощания с моей родной страной.
1942

Morto

Jen mi jam staras sur perono
de la muto,
Ĉe la neevitebla por ni ĉiuj rand'...
En tiu ŝip' atendas ankaŭ min kajuto,
Kaj vent' en veloj – kaj terur-minuto
De adiaŭo al la patroland'.
1942; tr. 2014

Konstantin Gusev *(omaĝe al la 100-jariĝo)*

Север

Опять июнь. Берёза и черёмуха.
И яркая трава, густая досиня.
И это небо, бьющее без промаха
бездонностью начала южной
осени.

И розами шиповника усеянный
привольный вымах пойменного
луга.
Так явственны в таёжном лике
севера
черты открытого степного юга.

Лес хмурится и тишиной
сторожкою
охватывает сразу… Но взгляни-ка:
вон, рядом с северянкою-
морошкою
цветёт твоя землячка-земляника!

Десятки тысяч вёрст в походах

Nordo

Junio jam. Betul' kaj padusdenso.
Kaj herbo de helverd' ĝis blua tono.
Kaj la ĉielo kun la senfundeco
de la komenc' de nia sudaŭtuno.

Kovritas per florar' de roz' sovaĝa
herbejo ĉerivera sukabunda.
La tajga nordo per vastaĵ' pejzaĝa
Similas al senlima stepo suda.

Arbaro faltas brovojn kaj en fino
vin kaptas per silento... Sed imagu:
apud moroŝko[1], bero-nordulino
Disfloras nia sudanino-frago!

Dum la milversta piediro mia
samkare brilis la stelar' senranda.
Jen super ni la firmament' Patria
kiel tegmento de la domo granda.

Por ni ne troas ajnaj verstaj miloj,
por nia paŝomanier' sen brido.

[1] *Moroŝko* – kamemoro, specio de rubuso kun flavruĝaj beroj (latine *Rubus chamaemorus*)

пройдены,
и всюду звёзды блещут
по-родному.
Встаёт над нами небо нашей
Родины
большою крышею большого дома.

Недалеки любые расстояния
для нашего размашистого лада.
Юг смотрит на полярные сияния,
в пустыню льётся севера прохлада.

Судьбой страны, её великой
участью,
мы сплочены в одну семью навеки.
И наша плоть – её поля могучие,
и наша кровь – её моря и реки.

1948

Rigardas sudo al la arktaj briloj,
al la dezerto fluas nord-tepido.

Per sort' de l' lando, ĝia
granddestino
ni unuecas, familiaj eroj.
Kaj nia karno – en kampar' sen fino,
kaj nia sang' – en maroj kaj riveroj.

1948; tr. 2016

Сыну

Ты в жизнь пришёл без почестей
и льгот,
своим бессильем вызывая боль
и жалость,
в тот год тяжелый, в тот великий год,
когда страна страдала и сражалась.

И матери, неловко перевив
куском холста нагие тельца эти,
крестили слабых первенцев своих
тем именем, что пело о победе.

На севере, на холоде ты рос,
где вьюга зла, а зимний сумрак
долог,
где вместе с деликатностью берёз
в окно смотрел неделикатный голод.

1948

Al la filo[1]

Senhelpa kaj sen estonteca klar'
vi en la vivo tiam ekaperis,
kiam en granda malfacila jar'
la lando bataladis kaj suferis.

Patrinoj sen sperthavo
pri bebvind'
per tol' kovradis knabojn
sur litbenko,
donante al unua sia id'
la nomon, kiu kantis pri la venko.

En norda frosto kreskis vi, etul',
kaj en fenestron tra blizardo hata
rigardis delikate vin betul'
en paro kun malsat' maldelikata.

1948; tr. 2016

[1] La versaĵo estas dediĉita al Viktor Gusev, la filo de la poeto

Апрель

Отчаянье зимы-беглянки:
с утра в степи белым-бело,
но трелью жаворонка в склянки
разбито холода стекло.

Трезвоном солнца мир заполнен!
Порвав с разгона повода,
трясёт саврасой гривой в полдень
по балкам полая вода.

Осмеивая оптом зимы,
из мокрой прели травы прут.
Озимые неотразимо
вздымают ровно изумруд.

Неудержимо потепленье,
цветенья щедрая пора!
Пошли в большое наступленье
по чернозёму трактора.

И ветер дарит песнь дубраве,
и пчёлы осаждают луг,
и всей звенящей далью правит
весенний животворный дух.

1958

Aprilo

Deprimas tio oldan vintron:
Ja blankas stepo en maten’,
Sed tril’ alaŭda fridan vitron
Finsplitas kun nenia pen’.

Plenitas mond’ de l’ sunfanfaro !
Kun la ŝirita tirrimen’
Skuas per flava kolhararo
La alta akvo en raven’.

Al la malica vintro spite
La herboj strebas al kreskalt’.
Aŭtunsemitoj senevite
leviĝas kiel glat-smerald’.

Ne eblas teni varminvadon,
alvenis la disflora temp’!
Komencis grandan avancadon
traktoroj tra la huma step’.

Abeloj portas zummaĵoron,
kantigas la kverkaron vent’,
kaj regas la sonoran ĥoron
printempa mago-dirigent’.

1958; tr. 2016

И в век, когда к далеким звездам...

В.Гусеву

И в век, когда к далёким звёздам выслали
Земляне быстрых огненных послов
И бесконечность мира мерят числами,
Безмерны смысл и суть обычных слов.

Eĉ nun, kiam allogas fora stela lum'…

Al V. Gusev[1]

Eĉ nun, kiam allogas fora stela lum’
Senditojn fulmrapidajn de la Ter’
Kaj mezuradi Kosmon oni celas plu,
Valoras same de la simplaj vortoj ver’.

Ĝermintaj en profundoj de l’ homar-uter’,

[1] Viktor Gusev – la filo de la poeto.

Рожденные в глубинах
человечества
И выношенные в тайниках души,
Они делами добрыми овечнятся
И не загинут в мировой глуши.

Не брезгуй, сын, моим советом
отческим,
Хоть прост он и у моды не в чести
И хоть нельзя машинам
переводческим,
Разъяв строку, его перевести.

Но пусть над колыбелью
и могилою,
И на моём, и на твоем веку
Звучит он
с прежней верностью и силою:
"Будь сердцем к сердцу
начеку!"

1961

Maturiĝintaj en l' anima sin',
Naskiĝis ili por bonagoj dum etern'
Kaj ne pereos en la mond-senfin'.

Ne movu flanken la konsilon patran,
fil',
Se ne konvenas ĝi al mor-inklin'
Kaj se ne eblas per tradukmaŝina il'
Tranĉinte frazon, interpreti ĝin.

Sed ekde la lulil' ĝis senevita mort',
Dum mia kaj dum via viv'
Ĝi sonu
kun la sama profundvera fort':
«Al koro koron
celu vi!»

1961; tr. 2016

Пусть природа неторопко…

В.К.

Пусть природа неторопко,
дали зеленью убрав,
поведёт вас тонкой тропкой
вглубь таинственных дубрав.

Чтоб была любой травинки
близкой радость или грусть,
ноги знали б все тропинки
без запинки наизусть.

Пусть к перу присохнет спора,
и газетная строка
навсегда вберёт из бора
аромат боровика!

1974

La naturo sen hastado…

Al V.K.[1]

La naturo sen hastado
tra ornam' de verda mar'
gvidu vin laŭ streta pado
en misteron de kverkar'.

De herbetoj ĝoj-spiradon
sentu vi per tuta kor',
kruroj konu ĉiun padon
sen stumblado laŭ memor'.

Pluma pinto kaptu sporon,
Gazetverko dum prepar'
sorbu la boled-odoron
el ĉi tiu pinarbar'!

1974; tr. 2016

[1] *V.K.* – Viktor Koĵemjako, amiko kaj kolego de la poeto

Кочевые стихи

За чернеющим мысом,
за горой обнажённою
поит осень кумысом
траву, солнцем сожжённую.

В полдень лёссовой мгою
даль от глаза не застлана.
Пахнет солью сухою
океана казахского!

В терпком ветра напитке
крепость пьяная древности.
В небе, в синей кибитке,
дремлет туча-кочевница!

La nomadaj versoj

La aŭtuno surfalas
trans terkapon senharan,
per kumiso regalas
sunvunditan herbaron.

Horizonton ne kovras
humopolva amaro.
Per seksalo odoras
La kazaĥa stipmaro.

En ventgluta promilo –
la antikva vingrado.
En ĉiel-veturilo
dormas nubo-nomado !

tr. 2016

11 ноября 1971 года

Тебе, Лю…

Пять помножим на одиннадцать –
и получим возраст твой.
Тихо сумерки надвинутся
над осеннею Москвой.
Просевая дождик меленький
через сито поздних дат,
Под Холщёвиками ельники
будут стыть и снега ждать.
Две пятёрки рядом вставшие,
две печалинки в глазах…
Пусть сегодня стали старше мы,
я хочу тебе сказать:
Что-то в мире не меняется
и не сводится к нулю!
Лю, тобою начинается
и кончается «люблю».
Помирились мы сединами
с недалёкою зимой.

La 11-a de novembro

Al vi, Lu[1], mia lumoporta amo…

Mi dek unu kvinobligas –
kaj rezultas via aĝ'.
La krepusko ekmalviglas
super Moskva dometaĝ'.
Dispersiĝas pluvaj strioj
tra kribril' de l' lasta dat',
Ĉe Ĥolŝĉoviki abioj
frostas en neĝ-atendad'.
Pariĝintaj kvin' kun kvino –
du tristetoj en rigard'...
Nek junul' kaj nek junino
estas ni, sed daŭras mart'.
Same mi pro l' am' vertiĝas,
same l' koro ardas plu.
Lu, per vi ja komenciĝas
kaj finiĝas lumoflu'!
Per grizharoj ni imitas
mornan vintron en proksim'.

[1] *Lu* – hejma nomo de Ludmila Guseva, la edzino de la poeto

Грусть, похрустывая льдинами,
входит в душу, как домой.
Старость близится, и лень её
гнать, прилипчивую…
Пусть
Повышается давление
и частит непрочный пульс.
Пусть разлягутся сугробами
надоедные снега
и морозами суровыми
досадит зима-карга,
что-то ей не подчиняется,
в чём-то ей не уступлю!
Лю, тобою начинается
и кончается «люблю».
Эта пасмурность осенняя
на листках календаря,
неприветливость косения
в хмуром взгляде ноября
зря холодной тиной тинятся,
зря суровеют стократ:
пять помножив на одиннадцать,
всё равно я жизни рад.
Льёт ли дождь, или метелица
мир по плечи занесла,
на себя самих лишь делятся
эти два простых числа.
Им и жизнь моя вменяется,
лишь на них себя делю.
Лю, тобою начинается
и кончается «люблю».
Утомляемы и маемы
непогодой дней и лет,
до улыбчивого мая мы
проторим упрямый след.
Перемелят годы-мельники
все печали поздних дат,
Под Холщёвиками ельники
будут внуков наших ждать.
Поглядим мы во вселенную,

Trist’ per glacier’ krepitas
kaj ekloĝas en l’ anim’.
Ĉiam nia aĝ’ pli altas,
maljuneco – ne abstrakt’.
Arteria premo saltas,
intermitas pulsa takt’…
Estu tiel: per neĝŝtormoj
tedu vintro-fiogrin’,
Kaj per frostoj super normoj
ĝi damaĝu ĉiam nin.
Tamen tute ne prestiĝas
ĝia sombra prem-influ’.
Lu, per vi ja komenciĝas
kaj finiĝas lumoflu’!
Tiu ĉi veter’ aŭtuna
sur la kalendara kart’,
la malafablec’ sensuna
en novembra strabrigard’
vane per malvarm’ nin ligas
kun enorma intensiv’ :
ni dek unu kvinobligas,
sed plu ĝojas pro la viv’.
Ĉu pluvegas, aŭ ĉu fridas
tuta mondo pro neĝar’,
persimeme sin dividas
la ciferoj de la par’.
Mi al tiu par’ subiĝas,
min per ĝi dividas plu.
Lu, per vi ja komenciĝas
kaj finiĝas lumoflu’!
Tra aŭtuna ĉi sengajo
de la tag- kaj viv-lini’
Al la ridetanta majo
sian vojon faros ni.
Tiu ĉi melankolio
muelitos far la temp’.
En Ĥolŝĉoviki abioj
revas jam pri nia nep’.
Ni observos Galaksion
kun mirsento de novic’,

как в весенний млечный дым,
дар природы – жизнь бесценную
внукам мы передадим.
Пусть для них
плывёт, качается
мир, подобный кораблю.
Лю, как стих,
тобой кончается
моё тихое «люблю».

1971

naturdoton – nian vivon
ni transdonos al nep-vic'.
Do, por ili
Universo
ŝipnavigu en marblu'.
Lu, finiĝas
kiel verso
per nom' via
lumoflu'.

1971; tr. 2016

Komentoj:

1. La aldonan parton de la moto en Esperanto-versio (... mia lumoporta amo) proponis la filo de la poeto Viktor Gusev en la privata letero al la tradukinto de la poemo.
2. Citaĵoj el la letero de Viktor Gusev, ligitaj kun la traduko de la poemo : «La vilaĝo Ĥolŝĉoviki [ĥolŝĉ'**o**viki] situas je distanco 69 km de Moskvo. En 1967 la ŝtato disponigis terenon al la redakcio de "Pravda" por la ĝardenkultura unuiĝo "Pravdist-1"... La patro, kiu estis verva fungemulo kaj ŝatanto de la sovaĝa naturo, elektis tie terpecon... Nia somerdomo kun la ĝardeno iĝis la plej bela dank' al arta talento de la patrino (*Ludmila Guseva* – L.N.) kaj laboremo de ĉiuj anoj de nia familio... La patrino verkis poemon pri Ĥolŝĉoviki, kiu estis publikigita en la redakcia ĵurnalo "Pravdist", kiu komenciĝis tiel: "Холщёвики, хоть имя древне, / Но есть в нём новь иной поры. / Ведь там на поле за деревней / Стучат правдистов топоры..." ("Ĥolŝĉoviki, kun nom' grandaĝa / Ekhavis novon de l' nuntemp'. / Sur la tereno postvilaĝa / Pravdistoj hakas en printemp'..." – traduko de L.Novikova).

Вы знали радость дней…

Вы знали радость дней, которым
ни месть, ни злоба не нужны, –
от мирных Родины просторов
до милой родинки жены.
И колыбельных песен ласка,
и смех детей звенел в ушах,
когда в разгул стального лязга
входили вы за шагом шаг.
И мы прошли дорогой длинной
к единой цели фронтовой,
где встал с ключом у стен Берлина
товарищ, павший под Москвой.

1943

Vi spertis ĝojon de la tagoj…

Vi spertis ĝojon de la tagoj,
En kiuj restis en pasint'
vastaĵoj de Patruj' sen plagoj,
nevuso ĉarma de l' edzin'.
Sonadis la kares' lulkanta
kaj rid' infana en orel',
kiam kun ŝtala grinco tanka
avancis ni al nia cel'.
Finiĝis longa voj' milita,
kaj kun ŝlosilo de Berlin'
ĉe Moskvo pereinta iam
kunbatalant' renkontis nin.

1943; tr. 2016

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)



En APERo

Ree lumas APERo
Invitante al fest'.
Vokis hela espero
Al ĝojbola tempest'.

Aĝo tute ne gravas
Ĉe esperantistar',
Kie varmas kaj ravas
L' amikec-malavar'.

Kantoj, ludoj, diskutoj –
Liberiĝu l' imag'!
De enu' eĉ ne gutoj
Dum eĉ horo de tag'.

En etos' la serena,
En la verva humor',
En l' inspir' vivoplena
Streĉitec' velkas for.

Feliĉiga libero –
Nek amar', nek deprim'.
Grandan dankon, APERo,
Pro la fest' en l' anim'!

"Sonoj" de APERo-2016

Ĉu por nur vintraj sonoj
Brilas nia kuniĝ'?
Ja en ajnaj sezonoj
Sonas rev' kaj feliĉ'!

Sonu birdo kaj vento,
Ĝoj' dum ajna veter',
Pardonemo kaj pento,
Pliverviga esper'!

Esperanto plu sonu,
Kiel voĉ' de amik',
Hejma kato ronronu
Je saniga muzik'!

Nur ne sonu eksplodoj,
Pafoj, kri' de dolor',
Veo pro misklopodoj,
Nur ne tim', nur ne plor'!

Sonu en ĉiu koro
Hela vivmelodi'
Pri donac' de favoro
En favora medi'!

Homo kun hundo

Oldulo iras malrapide
Kun ĉarme bon-sintena hund',
Alrigardanta lin konfide
El sia besta korprofund'.

Ĉu tiu grandaĝulo havas
Amikojn dum la vivtempest',
Por kiuj same kore gravas
Prizorgitec' de lia best'?

Ĉu soleculo rajtas teni
Amikon-beston apud si,
Se fate ĉiam povas veni
Blindiĝo aŭ apopleksi'?

Ne trafu hejman beston bato
Sin trovi sola en la dom'!
Neniam restu hund' aŭ kato
Sen varmo de apuda hom'!

La homo revas, ĝojas, miras –
Ne pensas li pri sia fin'.
Oldul' kun sia hundo iras.
Al kiu li restigos ĝin?

La fotoekspozicio "Virga Rusio"

Zizelo ĝojas, urs' petolas,
Perdrikon kaŝas neĝabund'.
En la natur' la vivo bolas –
En ĉiu kav', sur ĉiu fund'.

Balen' ridetas plenmuzele,
Proksimas link' al la viktim',
Somer' ekpompis flormantele –
La viv' sen rando kaj sen lim'.

Vulkanoj en silent' majesta
Alsorĉas per l' enigma fort'.
Humoro nekutime festa
Mildigas tondrojn de la sort'.

Impone migras cervogrego,
Magie brilas norda lum'.
Por la impres' de la belego
Ĉu eblas inda vortbrakum'?!

Dum streĉaj solvoj de problemo
Pri nova supermarkta bru'
Ĉe l' hom' kun ties detruemo
L' naturo ie virgas plu.

Pinoj ĉe betuloj

Pinoj aspektas mizere.
Branĉoj kaduke pendas.
Laca pinglar' malespere
Ĝojon por si atendas.

Baldaŭ ekverdos betuloj,
Kiuj apudas dense
Kaj inter mornaj kunuloj
Lumos je l' viv' intense.

En la betulkompanio
Pinoj pli gaje verdos
Kaj en la hela medio
Sombron de l' vestoj perdos.

Viglaj betuloj sugestos
La vivoĝojon brile.
Baldaŭ l' naturo ekfestos
Novan printempon jubile.

E-AGADO EN KRASNODAR: HISTORIO KAJ NUNTEMPO

Краснодар
Помощь детям
Esperanto